


EL POPOLA ĈINIO

中國新道

4

1974





Nova aspekto de Huajhe-rivero (*ĉinstila pentraĵo*)

En Rikolta Sezono


En 1973 Ĉinio akiris riĉan rikolton en agrikulturo. Ne nur produktokvanto de greno kaj kotono estis la plej alta en la historio, sed ankaŭ tiu de sukrodonaj plantaĵoj, juto kaj tabako atingis novan nivelon. Kaj abundan rikolton donis ankaŭ aliaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktoj. Sur la vastega tero de nia lando la komunumanoj kun plena ĝojo faris rikoltadon.



Ĉouhu-komunumo de Giangsu-provinco sukcesis en arta kulturado de perlo.

La kulturejo de akvaj produktaĵoj de Ljuda akiris abundan rikolton de laminario venkinte ventan katastrofon.





Forsto en antaŭa
alkala grundo


Parto de la anas-
bredejo de Ŝuj-
juan-komunumo
de Liaŭning-pro-
vinco





Membroj de Lugi-komunumo de Junnan-provinco plukas tabakfoliojn.

Diversaj delikataj korboj plektitaj per salikaj vergoj estas vaste akceptataj en kaj ekster la lando.





Produktokvanto de silkaj kokonoj en Luotian-gubernio de Hubej-provinco superis rekordon en la historio.

Fuŝun-gubernio de Siĉuan-provinco akiris riĉan rikolton de juto.



Ĝoukou-komunumo de Hunan-provinco kulturas lotusojn.



Juglandoj rikoltitaj de Ŝasiju-brigado de Hebej-provinco



Lin Biaŭ—vera disĉiplo de Kong Kiu

EN januaro ĉijare, la partia komitato de Kinghua-universitato starigis du kursojn por kadroj kaj studentoj respektive kun la celo serioze diskuti kiel profunde kritiki la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Lin Biaŭ kaj la doktrinojn de Kong Kiu kaj Meng Ke (konataj en la Okcidento sub la latinaj tradukoj per Kongfucio kaj Mengcio respektive), kiuj servas kiel reakcia ideologia batalilo por intrige kapti la potencon de la Partio kaj la ŝtato kaj restaŭri kapitalismon.

Dank' al diskutado en la kursoj oni ekhavis pli profundan komprenon pri la signifo de tiu batalo, kaj pri tio ke kritiko al Kong Kiu estas konsistiga parto de kritiko al Lin Biaŭ, kaj ke ĝi estas grava politika batalo. Oni klariĝis ke Lin Biaŭ vane celis imiti Kong Kiu por restaŭri kapitalismon, predikante "sinregi por restarigi la etiketon" (temas pri adekvatigo de la kondutoj al la sistemo de la sklava socio de Ĝou-dinastio, kiu estis disfalanta dum la tempo de Kong Kiu cedante la lokon al feŭda sistemo); li propagandis geniismon "scii ĉion denaske" de Kong Kiu por intrige kapti al si la potencon de la Partio kaj la ŝtato; li disvastigis la historian ideismaĵojn de Kong Kiu ke neŝanĝeblaj estas

nur la "supera geniulo kaj malsupera stultulo" inside insultante la laborulojn; kaj atakis la diktaturon de la proletaro per la terminoj de Kong Kiu kiel "bona moral-kvalito", "bonkoreco kaj justeco", "fideleco kaj indulgemo"; li kolportis "vojon de mezeco kaj konstanteco" por oponi kontraŭ la batala filozofio de Marksismo; li uzis la reakcian oportunisman vivfilozofion de Kong kaj Meng kaj komplotis kun egoismaj celoj por disvolvi insidajn intrigojn; li pledis por la ideo de ekspluata klaso, ke "kiuj laboras intelekte, devas regi; kiuj laboras fizike, devas esti regataj"; li atakis la vojon de kombiniĝo de intelektuloj kun laboristoj kaj kamparanoj kaj instigis sian filon al kultado de Kong Kiu kaj legado de liaj verkoj revante starigi heredan dinastion de Lin-familio; ktp. ktp. La kursanoj konstatis ke la reakcia linio de Lin Biaŭ en politiko, ideologio kaj organizo kaj liaj kontraŭrevoluciaj taktikoj estas strikte ligitaj kun la doktrinoj de Kong kaj Meng, kaj ke li estas vera disĉiplo de Kong Kiu.

Post profunda diskutado oni krome trovis ke la doktrinoj de Kong kaj Meng estas nenio alia ol la vojo al restaŭro kaj ke ili estas la komuna reakcia ideologia batalilo uzata de ĉiuj reprezentantoj de reakciaj re-

gantaj klasoj por trompi kaj subpremi la laborulojn. Ke li kultis la reakciajn doktrinojn de Kong kaj Meng en ilia kompleto kaj energie ilin propagandis, tio devenas de tio ke li provis returni la radon de la historio, vane intencis ŝanĝi la bazan linion de la Partio kaj restaŭri kapitalismon.

Iuj kursanoj diris: “Sinregi por restarigi la etiketon” estis la reakcia programo de Kong Kiu por restaŭri la sklavan sistemon. Lin Biaŭ ofte diradis ke “El sen-nombraj aferoj la plej grava estas sinregi por restarigi la etiketon”, tio malkovris plene lian kontraŭrevolucionan karierisman ambicion renversi la diktaturon de la proletaro por restaŭri kapitalismon kiel la plej gravan aferon. Aliaj kursanoj diris: Meng Ke kriaĉis ke “por enordigi la mondon en la nuna tempo, kiu taŭgas, se ne mi?” dum Lin Biaŭ rigardis sin kiel “ĉielan ĉevalon” kaj rigardis sin kiel “la plej noblan” superhomon, fanfaronante ke “la ĉiela ĉevalo trairas la ĉielon tien kaj reen sola sen akom-

pano”. Ankaŭ lia ĝismorta sekvanto Ĉen Boda same tion kriaĉis papage. Tio estas nenio alia ol agado de disĉiploj de Kong kaj Meng kaj plena malkovro de ilia ambicio restaŭri la malnovan reĝimon pere de ŝtatrenverso por efektivigi faŝisman kaj diktatoran regadon. En ligo de la restaŭra intrigo de Lin Biaŭ kun la diraĵoj kaj agadoj de historiaj personoj, kiuj celis restaŭradon kaj kun la fenomenoj de nuntempaj klasbataloj en la socio, ĉiuj sentis ke ĉio havas interrilatojn kun la doktrinoj de Kong kaj Meng. Sekve por preventi restaŭron kaj daŭrigi la revolucion necesas kapti la ultra-dekstreman esencon de provado de restaŭro en profunda kritikado kontraŭ Lin Biaŭ kaj Kong Kiu.

Dum diskutado en ligo kun la klasbatalo kaj linia batalo en la tereno de eduka revolucio, kaj kun la reformado de la mondkoncepto de intelektuloj, oni profunde sentis ke la kritiko al Kong Kiu ne estas afero malproksima de ili, sed tute

Ekspozicio pri Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucianismo aranĝita de Kinghua-universitato



aktuala batalo en rilato kun ŝanĝo de ilia mondkoncepto. Iuj kursanoj diris: La doktrinoj de Kong kaj Meng superregis en Ĉinio jam pli ol du mil jarojn kaj iliaj vidpunktoj kiel fiere rigardi laboristojn kaj kamparanojn, malalte taksu fizikajn laborojn, utiligi siajn sciojn kiel siajn propraĵojn por personaj profitoj, “fariĝi burokratoj post sukcesa sinklerigo” ktp., kies influoj konstante aperas kiel problemoj en pensado. Nur draste kritiki la doktrinojn de Kong kaj Meng povos elfosi iliajn plej profundajn radikojn. Dank’ al tio ankaŭ la reformado de la mondkoncepto de intelektuloj certe povos esti multe akcelita.

La kursanoj unuvoĉe konstatis dum diskutado ke profunde kritiki Lin Biaŭ kaj Kong Kiu estas grava afero por firmigi kaj disvolvi la fruktojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, por solidigi la diktaturon de la proletaro kaj preventi la restaŭron de kapitalismo. Ĝi estas revolucio por ĝisfunda rompiĝo kun la malnova kulturo, malnovaj tradiciaĉoj kaj malnova ideologio kaj estas ankaŭ bezono por profunde disvolvi klasbatalon en la

tereno de ideologio kaj reformo de intelektuloj.

Samtempe la universitato ankaŭ aranĝis ekspozicion pri kritiko al Kong Kiu por antaŭenpuŝi profunden la amasan movadon de kritiko al Lin Biaŭ kaj Kong Kiu.

Intelektaj gejunuloj de popola komunumo skribas dazibaŭ-ojn por kritiki Lin Biaŭ kaj konfucianismon.



Murgazeto pri Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucianismo kune aranĝita de instruistoj kaj studentoj de la Pekina Universitato kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de antaŭ-urbo de Pekino

Konfucio — pensulo kiu obstine defendis la sklavsistemon

KIA homo estis Konfucio, kiu estis senĉese kultata kiel “saĝulo” de la ĉina reakcia reganta klaso dum pli ol du mil jaroj?

Lenin montris ke “la absoluta postulo de la marksisma teorio en analizado de kia ajn socia problemo estas meti ĝin en definitivajn kadrojn historiajn” (*Pri la Rajto de Nacioj pri Memdetermino*). Por analizi la personecon de Konfucio per la vidpunkto de historia materiismo, necesas rigardi lin laŭ siatempa klasbatala situacio, nome, sur la starpunkto de kiu klaso li staris, kaj al la interesoj de kiu klaso lia penso servis.

LA POLITIKA STARPUNKTO DE KONFUCIO

Konfucio vivis dum 551-479 a.K. en la regno Lu kiel posteulo de jam dekadencia sklavposedinta aristokrato de Jinklano. Li troviĝis ĝuste en la fina periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). Tiam la sklavo senĉese leviĝis kontraŭ la kruela ekspluato kaj subpremado fare de sklavposedantoj. Ekzemple, la muregokonstruaj sklavo de la regno Ĉen tumultis perforte en 550 a.K.; la “laboruloj” (plejparte sklavo-metiistoj) de la reĝa familio de Ĝoŭ ribelis en 520 a.K.; la sklavo-metiistoj de la regno Vej sieĝis dukon Ĝuang de Vej en 478 a.K. kaj post ok jaroj ili denove leviĝis kaj forpelis markizon Ĝe. Per forkuroj aŭ perfortaj

ribejoj la sklavo leviĝis kontraŭstari kaj ŝanceli la regadon de la sklavposedantaj aristokratoj — la sklava sistemo skuiĝis al disfalo kaj la novaj feŭdaj fortoj jam leviĝis. Tial la batalo inter la sklavo kaj sklavposedantoj kaj la batalo inter la nove leviĝanta klaso de terposedantoj kaj la dekadencaj sklavposedantaj aristokratoj estis la ĉefaj klaskontraŭdiro kaj klasbatalo en tiu tempo.

Kaj ĉe kiu flanko staris Konfucio? Tion povas evidentigi la jenaj faktoj:

En tiu tempo, sub la puŝado de la klasbatalo farita de la sklavo kaj aliaj sekcioj de la popolamasoj, la terposeda sistemo komencis ŝanĝiĝi. Origine en Jindinastio (ĉ. la 16-a jarcento — la 11-a jarcento a.K.) kaj la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (ĉ. la 11-a jarcento — 770 a.K.) kiam regis la sklava sistemo, la tuta tero apartenis al la plej granda ĉefo de la sklavposedantaj aristokratoj — la monarĥo (reĝa familio), dum la diversrangaj sklavposedantaj vasaloj (dukaj familioj), Ĉing-oj (ministroj), *dafu*-oj (superaj oficistoj) kaj malpli superaj sklavposedantoj, kiuj ricevis bienojn, ĝuis ne la propretecon sed nur la uzofrukton. Tial tia tero estis nomata “publikaj kampoj”. En la meza periodo de Printempo kaj Aŭtuno, iuj novaj fortoj de feŭdaj terposedantoj leviĝis kaj agrigis teron kiel privatajn kampojn kun alodeco, kiuj fariĝis iom post iom pli vastaj kaj estis vendeblaj. En la komenco la reĝa kaj dukaj familioj ne rekonis tiujn privatajn

kampojn; poste por forskui la financajn malfacilojn ili estis devigitaj imposti la privatajn kampojn kaj rekoni la feŭdan terposedan rajton. En la regno Lu kie vivis Konfucio, komenciĝis imposti la privatajn kampojn en 594 a.K. Tio signis la transformiĝon de terposeda sistemo de sklavismo al feŭdismo kaj tiel aperis la novaj produktaj rilatoj de terposedantoj kaj farmistoj kaj de memstaraj terkulturistoj transformiĝintaj el malriĉaj popolanoj ktp. Kaj disvolviĝis la individua ekonomio.

Tiam en la regno Lu estis tri familioj Gisun, Mengsun kaj Ŝusun, kiuj estis reprezentantoj de la nove leviĝantaj fortoj. En la jaro 562 a.K. ili dividis parton de la feŭdo de la duka familio en tri porciojn kaj ĉiu el ili prenis unu. Gisun praktikis la novan sistemon de impostado. Post 25 jaroj ili plue dividis la feŭdon de la duka familio en kvar porciojn. En tiu ĉi fojo same kiel Gisun ankaŭ Mengsun kaj Ŝusun aplikis la sistemon de imposto, ŝanĝante la produktajn rilatojn. Tio estis atako farita de disvolviĝanta feŭda sistemo kontraŭ la disfalanta sklava sistemo, ago kun progressa karaktero.

Kian sintenon prenis Konfucio rilate al tiu afero?

Laŭ lia opinio Gisun, Mengsun kaj Ŝusun estis propre sklavposedantoj kaj *dafu*-oj, sed ili tiel ignoris la limon de sia rajto (“troigi sian ambicion”), subfosante la tradician sklavan sistemon devenintan de Jin-dinastio. Ĉu tio estas tolerbla? Tial li volis uzi ĉiajn rimedojn por redukti la fortojn de la tri familioj kaj defendi la sklavposedantan regadon de la duka familio de la regno Lu.

Tiutempe la disĉiplo de Konfucio Ĵan Kiu subtenis la reformadon praktikatan de Gisun. Konfucio tre indigniĝis, kondamnante ke la disĉiplo perfidis la “kodon de la Duko de Ĝou”, t.e. la regulojn kaj sistemon de la sklava socio (la 11-a ja-

ro de duko Aj, *Zuo Guan*). Konfucio plie ekskomunikis lin kiel sian disĉiplon kaj ordonis la aliajn “ataki lin sonigante tamburojn” por ĉirkaŭataki Ĵan Kiu (“Ĥian Ĝin”, *Lun Ju*).

Ĉu tiu fakto ne plej klare montris, kiun sistemon Konfucio kontraŭstaris kaj kiun sistemon li defendis?

Kaj simila afero okazis ankaŭ en la regno Ki. La reprezentanto de la nove leviĝantaj fortoj de la regno estis Tian Ĉengzi aŭ Ĉen Ĉengzi (en la antikvo Tian kaj Ĉen estis de la sama familio), kiu, por oponi kontraŭ la putraj fortoj de sklavposedantaj aristokratoj regantaj la regnon Ki, gajnis la amasojn per la rimedo pruntedoni grenon per granda mezurilo kaj akcepti redonaĵon per malgranda mezurilo kaj fine sukcesis mortigi en la jaro 485 a.K. dukon Ĝian, la ĉefon de sklavposedantaj aristokratoj de Ki. Konfucio tre indigniĝis pri tiu evento kaj konsilis energie dukon Aj de la regno Lu, ke li ekspedu punantajn trupojn, tamen la lasta ne konsentis tion, konsciante ke liaj fortoj estas tro malgrandaj por venki la regnon Ki.

La tria afero estis lia opono kontraŭ la fandigo de *ding-o* (tripieda kuirujego) kun punkodo.

En tiu tempo, pro la senĉesa rezistado de la sklavo kaj leviĝo de la feŭdaj fortoj, la origine praktikata “regado laŭ etiketo” ne povis plu daŭri kaj ne povis ne esti anstataŭita per “regado laŭ leĝo”. La “regado laŭ etiketo” de la sklava sistemo fakte estis regado per fikso de la rilatoj inter superuloj kaj subuloj aŭ la sklavposedantoj kaj sklavoj. La sklavposedantoj estis regantoj de la sklavoj, iliaj voloj estis leĝoj por la lastaj, kiuj rajtis nur obei kaj kies ĉia malobeco estis malpermesita. La sklavposedantoj povis laŭvole subpremi kaj ekspluati kaj eĉ mortigi sklavojn. Tio estis la t.n. “regado laŭ etiketo”. Sed tiutempe la sklavoj jam ne estis tiel obeemaj kaj ĉie okazis rezistoj.

Kiuj havis progreseman tendencon kaj rimarkis la elmontriĝintan situacion, komprenis ke estas necese ŝanĝi la ĝistiaman regmanieron kaj difini iajn leĝajn regulojn koncerne al la rilatoj inter la aristokratoj kaj sklavoj por iel limigi la arbitrecojn de la sklavposedantoj, fandmulditajn sur *ding-on* sub la nomo de “puna kodo”, por ke la publiko povu vidi ĝin — tio estis “fandigo de *ding-o* kun punkodo”. Tiu kodo disvolviĝis poste en leĝon — parton de la superstrukturo de la feŭda socio. Kiuj pledis por “regado laŭ leĝo” estis la legalizistoj, la reprezentantoj de la nove leviĝintaj feŭdaj fortoj.

Ankaŭ kontraŭ tiu afero Konfucio forte oponis. En la jaro 513 a.K. aŭdinte ke la regno Ĝin fandigis tian *ding-on*, Konfucio tre malaprobe diris: Kiel elmontri la dignon kaj majestecon de la aristokratoj, se oni miksu ilin kun la sklavoj? Sekve de tio ne plu estos diferencoj inter la nobelaj kaj plebaj, kia socio tiam fariĝos (la 29-a jaro de duko Ĝaŭ, *Zuo Ĝuan*)?

La kvara afero estis la mortigo de Ŝaŭĝeng Maŭ fare de Konfucio.

Dum la tuta vivo Konfucio aspiris al potenca posteno por efektiviĝi sian reaktan politikan idealon. Sed nur en 497 a.K. li sukcesis fariĝi justicministro kaj aganta ĉefministro de la regno Lu nur por 3 monatoj. Sep tagojn post sia enoficiĝo li ekzekutigis Ŝaŭĝeng Maŭ, kiu estis fama reformisto en la regno.

Kiel konate en la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj de Militantaj Regnoj multaj pensuloj reprezentante diversajn klasojn fondis siajn skolojn argumentantajn unu kontraŭ aliaj. Same kiel Konfucio, Ŝaŭĝeng Maŭ havis katedron en Lu kaj varbis disĉiplojn por prelegi pri siaj tezoj. Iliaj du skoloj de penso estis tute antagonismaj unu kun la alia. La mortigo de Ŝaŭĝeng Maŭ fare de Konfucio estis fakte esprimo de klasbatalo en tiu tempo. Vidu, kiajn kulpojn havis la mortpunito, laŭ la deklaro de Konfucio kiel notitajn en “Joŭ Zuo” de *Hjunzi*.

Konfucio diris, ke tiu, kiu kulpas pri unu el jenaj kvin krimoj devas esti mortpunita.

1. Kiu konas klare la ŝanĝiĝon de la tempoj antikva kaj nuna kaj komprenas la disvolvadon de la aferoj, facile iras la vojon de renverso;
2. Kiu ne iras laŭ la ortodoksa vojo de sklavsistemo, sed obstine iras sian novan t.n. reforman vojon;
3. Kiu scipovas pravigi elokvente siajn reformajn argumentojn;
4. Kiu scias multon pri la putraj fenomenoj kaj malstabilaj simptomoj de la regado de la sklava sistemo;
5. Kiu scias rezoni kontraŭ la sklava sistemo en vortoj rigoraj kaj argumentoj brilaj.



Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio de iu regimento de la Kantona Trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj profesoro Jang Ĵongguo (la tria de dekstre) de Ĝongŝan-universitato diskutas pri la interrilato inter kritiko kontraŭ konfucianismo kaj kritiko kontraŭ Lin Biaŭ.

Laŭ Konfucio, Ŝaŭĝeng Maŭ kiu kulpis pri ĉiuj tiuj kvin krimoj, estis tial nepardonebla. Laŭ tiuj kvin punktoj Konfucio verdiktis lian kazon, t.e.:

1. Grupigi amasojn en organizon;
2. Agiti per herezaĵoj;
3. Konfuzi veron kun malvero.

Ŝaŭĝeng Maŭ propagandis reformajn ideojn konforme al historia disvolviĝo kaj la deziroj de la popolo. En tiu tempo la amasoj ame respektis lin, rigardante lin kiel elstaran personon.

Nu sufiĉas jam tiuj faktoj por pruvi ke Konfucio obstine staris sur la flanko de la disfalanta sklava sistemo kaj firme oponis kontraŭ la reformoj de la nove leviĝanta feŭda sistemo.

En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, pereis 52 sklavismaj regnoj unu post alia kaj la sklava sistemo disfalis kun ĉiu tago. Kaj en tiu tempo Konfucio elmetis sian politikan sloganon: “Restarigi la pereintajn regnojn, daŭrigi la interrompitajn aristokratajn familiojn, relevi la defalintajn homojn.” (“Jaŭ Jue”, *Lun Ju*) Tio signifis revivigi la pereintajn landojn de sklava sistemo; redoni la regpotencon al la sklavposedantaj aristokratoj; rehavigi al la jam falintaj sklavposedantaj aristokratoj postenojn por direkti la regadon. Ĝi estis politika slogano reakcia de la kapo ĝis la piedoj por restaŭri la malnovan ordon. Sed Konfucio prenis tion “kiel sian taskon” kaj decidis klopodi “ĝis sia lasta tago”. La popolo siatempe tre abomenis lin. Iu pordgardisto insulte nomis lin homo nekonanta la aktualan tendencon de la historio (“fari konscie la neblaĵon” — “Hian Ven”, *Lun Ju*) kaj reakciulo aganta kontraŭ la epoko. En iuj lokoj, la amasoj ĉirkaŭatakis Konfucion kaj liajn disĉiplojn, kiuj vojaĝis diverslanden por kolporti siajn tezojn, tiel ke ili panike forkuris kiel “hundoj perdintaj hejmon”. Tio estis merita puno por Konfucio, kiu staris sur la reakcia starpunkto.

“BONKORECO” — PENSO DE KONFUCIO

La penskerono de Konfucio estis “bonkoreco” (ĉine “*jen*”). Tiu “bonkoreco” estis propre la ideologio de la sklavposedanta klaso de dinastioj Jin kaj Okcidenta Ĝoŭ.

Por firmigi sian klasan solidarecon kaj por solidigi la regadon de la sklavposedantaj aristokratoj, la sklavposedantoj-regantoj de Jin kaj Ĝoŭ propagandis la ideon de “bonkoreco” kaj tiu vorto “*jen*” jam frue estis en surskriboj sur testudokarapacoj kaj bestaj ostoj trovitaj de arkeologoj. Per “*jen*” ili celis interamon kaj solidarecon interne de sia klaso kaj samtempe trompis la sklavigitajn laborulojn, por ke la lastaj sen kontraŭstaro obeu ilian regadon (“kun korklino al la bonkoraj” — Parto 3 de “Taj Gia”, *Ŝang Ŝu*). Ĉu la duko de Ĝoŭ, la plej adorata “saĝulo” de Konfucio, ne diris ke li mem estas bonkora, ama kaj plie obeema al la antaŭuloj (“mi estas bonkora kaj obeema al miaj prapatroj” — “Gin Teng”, *Ĝoŭ Ŝu*)? Laŭ ilia vidpunkto, kondiĉe nur ke ĉiuj membroj de la sklavposedanta klaso estas intimaj kaj amaj inter si kaj povas esti obeemaj al la klanaj prapatroj, la regado de sklavposedantaj aristokratoj povas firmiĝi. Sekve ilia konkludo estis: “bonkoreco kaj intimeco” estas “trezoro” (“Tan Gong”, *Li Gi*). Tio montris, kiel treege grava la sklavposedantoj rigardis “*jen*”.

Konfucio faris sisteman indukton kaj eksplikojn. Li atribuis multajn enhavojn al “*jen*” kiel: “amo kaj respekto al la gepatroj kaj pliaĝa frato”, “fideleco kaj indulgemo”, “ĝustigo de nomoj”, “bonmoraleco”, “saĝo” ktp. Analizante tiujn enhavojn, ni povas vidi, al la intereso de kiu klaso servis la pensoj de Konfucio.

Konfucio induktis ke “amo kaj respekto al la gepatroj” kaj “amo kaj respekto al pliaĝa frato” estas la bazoj de “*jen*”.

Kial? Ĉar en la sklava sistemo de la antikveco la klanaj aristokratoj havis la regpotencon. La sklavposedantoj kiel reganta klaso apartenis al la sama klando kun la samaj prapatroj. Konfucio sentis ke siatempe tre akraj estas la kontraŭdiroj interne de la sklavposedantoj, unuj rab-batalas kontraŭ aliaj, kaj tiel tio kondukos la sklavposedantan regadon al disfalo. Tial li montris ke se interne de la sklavposedantoj ĉiuj amus kaj respektus la prapatrojn kaj gepatrojn, la sklavposedantoj unuiĝus vertikale. La amo kaj respekto inter fratoj estas ligilo en horizontalo, se la fratoj amus kaj respektus unuj la aliajn, la sklavposedantoj ankaŭ povus esti horizontale unuigitaj. Se ĉio ĉi tio estus atingita, ne okazus ribeloj kontraŭ la superuloj. Samtempe la praktikado de ĉi tio fare de la sklavposedantoj influus ankaŭ la sklavojn al honesteco (“la moral-kvalito de la popolo tendencos al honesteco” — “Hjue Er”, *Lun Ju*), kaj ili sen malhonestajtoj obeus la regadon de la sklavposedantoj.

Ankaŭ la t.n. “fideleco kaj indulgemo” estis tute je la servo al la interesoj de sklavposedantoj. Per pledado por “fideleco” Konfucio postulis ke la sklavoj estu fidelaj al la sklavposedantoj, la superaj oficistoj kaj vasaloj al la dukoj kaj la dukoj al la monarĥo de Ĝoŭ-dinastio, kun la celo solidigi la diversrangan regadon de la sklavposedantoj. Li pledadis por “indulgemo” predikante ke “oni ne faru al aliaj kion oni mem ne deziras ricevi” (“Jan Juan”, *Lun Ju*), sed tio kion Konfucio proponis koncernis nur al la sklavposedantoj, kiuj jam ruiniĝis, sed absolute ne al la sklavoj. Konfucio mem estis posteulo de tia ruiniĝinta sklavposedanta aristokrato. Dum sia junaĝo li plenumis multajn aferojn malnobelajn, kiel administrado de tenejo kaj paŝtado. Li bone sciis zorgi homojn, kia li mem estis. Li admonis ke oni ne postulu tro da perfekteco (“Ne postulu de iu kompletan perfektecon.” — “Vej Zi”, *Lun Ju*) de sklavposedanto jam ruini-

ĝinta. Se tiu ne havas tro grandan kulpon, oni ne devas lin flanken lasi. Interne de sklavposedantoj oni “forĵetu neniun malnovan kunulon”, por ke ĉiuj unuiĝu solide por preventi ribelojn de sklavoj.

Kiel supre dirite, la periodo de Printempo kaj Aŭtuno estis tempo de giganta ŝanĝiĝo, dum kiu la nove leviĝantaj feŭdaj fortoj emergis kiel Gisun en la regno Lu kaj Tian en la regno Ki, kiuj ĉiuj atakis la regadon de sklavposedantaj aristokratoj kaj ŝanĝis la malnovajn produktajn rilatojn, disrompante la “regadon laŭ etiketo” de sklavsistemo. Konfucio konsideris ke tio estas malo de “jen”, kaŭze de tio ke la novaj fortoj ne scias superregi siajn ambiciojn kaj limigi siajn agojn. Li do elmetis la rimedon sekvatan ekde la dinastioj Jin kaj Okcidenta Ĝoŭ. En *Zuo Ĝuan* estas skribite ke “Konfucio diris: Restas notoj de la antikveco ke sinregi por restarigi la etiketon estas ‘jen’”. Li diris al sia disĉiplo Jan Juan: “sinregi por restarigi la etiketon instigos la mondon al ‘jen’ .” Se nur la sklavposedantoj ĉiuj povas superregi siajn ambiciojn kaj agojn por restarigi la etiketan regadon, la sklavoj sen malhonesto obeos la regadon. Tio estis “la mondo submetiĝos al ‘jen’”. Tiamaniere la regado de la sklavposedantoj solidiĝos daŭre.

Pro tio Konfucio ankaŭ energie distrumpetis “ĝustigon de nomoj” (“Zi Lu”, *Lun Ju*).

Kio estis la signifo de tio? Tio estis determini kaj enkadrigi la objektivajn ekzistantaĵojn per subjektiva ideo (“nomoj”).

La kaŭzo de tio kuŝis en tio, ke sub la kruela regado de la sklavposedantoj, la sklavoj senĉese ribelis kaj leviĝis ankaŭ la nove emergintaj feŭdaj fortoj, kaj la produktaj rilatoj senĉese ŝanĝiĝadis, tiel ke la ordo de la sklava socio treege konfuziĝis (“disfalas la etiketo kaj difektiĝas la muziko”). En tiu tempo la ordonoj politikaj kaj militaj jam ne venis de la sklavposedanta suvereno — la monarĥo de Ĝoŭ; ankaŭ la potenco de la dukoj de diversaj regnoj estis nestabila,

kaj en iuj landoj la potenco jam falis en la manon de la superaj oficistoj kaj vasaloj. Aliflanke, homoj kiel Ŝaŭĝeng Maŭ libere grupigis la amasojn en societojn kaj senbride kritikis la aŭtoritatojn. La situacio jam fariĝis tia ke la suvereno ne plu estis suvereno, la subuloj ne plu subuloj, la patroj ne plu patroj kaj la filoj ne plu filoj. En tia stato, kio rezultiĝos poste? Konfucio do decidis klopodi por restarigi la malnovan ordon ke la suvereno, subuloj, patroj kaj filoj restu en siaj adekvataj pozicioj, kun la vana espero elsavi la regadon de sklavposedantaj aristokratoj el disfalo, per la rimedo uzi la subjektivan idearon de la sklavposedanta klaso praktikata de la dinastioj Jin kaj Okcidenta Ĝoŭ.

Laŭdire, pro tiu celo li verkis siatempe aktualan historion titolitan *Printempo kaj Aŭtuno*. Mengcio en pli posta tempo asertis ke tiu historia verko timigis “la uzurpajn subulojn kaj malbonajn filojn”. Ĉar ĝi estis skribita laŭ la vidpunkto de ĝustigitaj nomoj, por ke la jam ŝanĝita socia realeco revenu al sia malnova stato kaj restariĝu la malnova ordo. Mengcio laŭte fanfaronis ke la verko de Konfucio reĝustigis la konfuzitajn nomojn, kaj ke tio estis uzo de la plej alta povo de la monarĥo de Ĝoŭ — por solidigi la regadon de sklava sistemo. Sekve la afero estis nekompareble grava kaj indus plej grave noti ĝin (“Duko Ven de Teng”, Parto 2, *Mengcio*).

En efektiveco, tio estis nur alia esprimo de la obstina starpunkto de Konfucio.

Krome, tio estis ankaŭ en la amplekso de la funkcio de “*jen*” kiel nomita de Konfucio.

Kiam Konfucio parolis pri “bonmoraleco” — “en regado” oni devas apliki “bonmoralecon”, ankaŭ tio ne signifas ke oni devas fari la samon ankaŭ en rilatoj al la sklavigitaj laboruloj, sed sole interne de la klaso de sklavposedantoj mem. La artikolo titolita “Li Lun” en *Hjunzi* diras (en la nuna

lingvo): “Kiuĵ loĝas en la urbo, ĉefe estas nobeloj — grandaj kaj malgrandaj sklavposedantoj; la popolo — sklavoj ĉefe loĝas ekster ĝi.” Tiutempe oni diris: “Bonmoraleco milde regu en la meza lando; punoj respektigu la eksterulojn en la kvar flankoj de la lando” (la 25-a jaro de duko Hi, *Zuo Ĝuan*). La “lando” ĉi tie signifas urbon. Tio same signifas ke “bonmoraleco estis aplikebla nur al la sklavposedantoj grandaj kaj malgrandaj en la urbo; sed al la sklavigita laboranta popolo ekster la urbo povis esti aplikataj nur punoj. La uzo de skurĝo kontraŭ la laboranta popolo estis la “regado de bonmoraleco”, jen ĉio!

Laŭ Konfucio “*jen*” inkluzivas ankaŭ saĝon — sciojn. Li energie distrumpetis ke “nur la superaj saĝuloj kaj la malsuperaj stultuloj ne ŝanĝiĝas” (“Jang Huo”, *Lun Ju*). Tio signifas ke “saĝuloj” de sklavposedantoj estas superaj genioj kaj la sklavoj estas nur malsuperaj lakeoj. Unuj estis absolute saĝaj, dum la aliaj absolute stultaj; la du klasoj estis neniel ŝanĝeblaj. De kie venas la t.n. scioj de genioj? Li klarigis dirante: “Kiuĵ scias denaske, estas la superaj” (“Gi Ŝi”, *Lun Ju*), kaj per tio asertante ke la scioj de la “saĝuloj” estas de la naturo donitaj kaj nedevenantaj de praktikado. Tiel Konfucio malkaŝe pledis por ideisma apriorismo kaj la reakcia absurdaĵo ke “herooj kreas la historion”.

Tial Konfucio tute malŝate taksis produktajn laborojn. Foje kiam lia disĉiplo Fan Ĉi petis instruojn pri agrikulturaj scioj, Konfucio tre malŝatis la peton, dirante kun indigno: Tio estas afero por sklavoj, pri ĝi mi tute ne okupiĝas. Li rigardis Fan Ĉi kiel “malsuperulon” (“Zi Lu”, *Lun Ju*). Sed kiel la laboruloj respondis al tiu lia sinteno? Foje iu maljuna kamparano, kiu dum sia sarkado sur kampo vidis Konfucion, diris ke li estas homo kun “membroj nelaboremaj, kiu ne scipovas distingi la kvin grenojn” kaj scias sole vivi je alies laborfrukto kiel parazito (“Vej Zi”, *Lun Ju*). Tio estis la plej ĝusta takso pri Konfucio.

Pri “*jen*” Konfucio diris tre multe, sed liekskludis la sklavigitan laborantan popolon el la sfero de “*jen*”. Laŭ li, la sklavoj estis destinitaj por servado kaj plenumo de ordonoj, kaj ne decidis fari al ili rezonadon (“Al la laboranta popolo oni povas ordoni kion fari, sed ne devas havigi scion” — “Taj Bo”, *Lun Ju*). Li insultis ilin kiel birdojn kaj bestojn kiuj neniel indas esti kunuloj de la sklavposedantaj aristokrataj moŝtoj (“Vej Zi”, *Lun Ju*). Li speciale malestimis la virinojn, konsiderante ke la virinoj kaj sklavoj estas malfacile “paŝteblaj” kaj trakteblaj, nek proksimigindaj (“Jang Huo”, *Lun Ju*). Li opiniis ke inter la sklavposedantoj povas esti homoj nebonkoraj, sed inter la sklavoj neniam estas bonkoraj (“Hian Ven”, *Lun Ju*).

El tio, oni povas facile vidi ke la eldiro de Konfucio ke “bonkoreco signifas ami homojn” estis simple mensogo. Li ne celis ami ĉiujn senescepte (inkluzive la sklavojn), sed ami sole la homojn el la sklavposedanta klaso. Li diris ankaŭ pri “amo al la amasoj en ĝeneraleco”, ŝajne al ĉiuj senescepte. Sed, ĉar en efektiveco, kun la paso de la tempo, la senco de la vorto “amaso” tiutempe jam ne plu entenis ankaŭ la sklavojn kiel dum Jin-dinastio kaj la komenca periodo de Okcidenta Ĝoŭ-dinastio sed aludis nur la diversrangajn aristokratojn (klarigo de Ĝeng Hjuan en “Kju Li”, *Li Gi*), tial la objekto de lia amo estis nur la sklavposedanta klaso.

Prezidanto Maŭ diris: “**Koncerne al la t.n. ‘amo de la homaro’, neniam ekzistis tia unueca amo depost la dividiĝo de la homaro en klasojn. Ĉiuj regantaj klasoj en la pasinteco ŝatis pledi por tia amo, kaj ankaŭ multaj el la t.n. saĝuloj kaj virtuloj ŝatis pledi por ĝi, sed neniu ĝin praktikis efektive, ĉar ĝi estas ne praktikebla en klasa socio.**” (*Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*) Do ni nepre ne estu trompitaj de Konfucio, malgraŭ ke li eldiris tre multajn belajn vortojn, kiaj “sinteni bone al parencoj”, “rekompenci

al faritaj servoj”, “rekomendi virtulojn”, “servigi kapablulojn”, “teni amon en la koro” ktp. Ĉio ĉi tio ja koncernis nur la membrojn interne de la sklavposedanta klaso, kaj “ne aplikebla al la laboranta popolo” (“Da Ĝuan”, *Li Gi*). La sklavoj ja ne estis inkluditaj, ili povis nur esti sklavigataj, vipataj kaj mortigataj.

El la supra simpla analizo oni facile vidas ke malgraŭ la oftaj paroloj de Konfucio pri “bonkoreco, justeco, vero kaj bonmoraleco” per belaj vortoj, en efektiveco ĉiuj liaj pensoj servis senescepte al la intereso de la disfalanta klaso de sklavposedantaj aristokratoj.

En tiu tempo, Hjun Zi kaj legalizistoj kiaj lia disĉiplo Han Fej kontraŭstaris konfucianismon kaj prenis progresan starpunkton de la feŭda klaso. La tiama batalo inter la du skoloj estis esprimo de klasbatalo sur la ideologia fronto.

Starante siatempe sur la starpunkto de la disfalanta klaso de sklavposedantaj aristokratoj, Konfucio oponis kontraŭ la nove leviĝantaj feŭdaj fortoj, kaj la esenco de liaj pensoj estis defendi la regadon de la sklavposedanta klaso kaj argumenti ke la laboranta popolo povas esti nur ekspluatata, sklavigata kaj superregata. Unuvorte, li volis pruvi: “Ekspluato estas prava, kaj ribelo estas krima.” Tial la postaj ekspluataj klasoj, ĉu de feŭdaj terposedantoj, ĉu de burĝoj, ĉiuj povis oponi kontraŭ Konfucio, kriante “for la butikon de Konfucio” antaŭ akiro de la potenco; sed kiam iutage ili akiris la regpotencon kiel reganta klaso, tiam ili senescepte utiligis la pensojn de Konfucio por trompi la laborantan popolon, en servo al sia reakcia regado. Sekve, de pli ol du mil jaroj, Konfucio estis kultata de ili kiel “Plej Sankta Majstro”. Nur starante sur la starpunkto de la proleta klaso kaj uzante la vidpunkton de marksisma historia materiismo, oni povas malkovri la reakcian esencon de Konfucio.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “La hodiaŭa Ĉinio estas disvolvo de la historia Ĉinio; ni estas marksistoj-historiistoj kaj ne devas detranĉi la historion. Ni devas resumi la historion de Konfucio ĝis Sun Jatsen kaj heredi tiun multvaloran heredaĵon. Tio donos gravan helpon por gvidi la nunan movadon.” (*La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito*)

Por pritaksi historiajn personojn per la marksisma vidpunkto, estas necese antaŭ ĉio analizi siatempajn klasajn kontraŭdirojn kaj klasajn batalojn en la historio, por vidi sub la kondiĉoj de la koncerna historia

disvolviĝo, ĉu la koncernato staris sur la flanko de progresema klaso kaj subtenis reformadon, aŭ male staris sur la flanko de reakcia klaso kaj pledis por konservativismo. La tasko de marksistoj estas puŝi la historion al disvolviĝo senĉese antaŭen. Nur tion, kio ludis rolon de progresado en la historio, ni jesas; ĉion reakcian, konservativan ni devas firme nei kaj kritiki. Sekve, kritikado de la reakciaj pensoj de Konfucio donos helpon por partopreni en la aktuala klasbatalo, precipe por konduki la klasbatalon sur ideologia kampo de superstrukturo.

Malica motivo, malnoblaj artifikoj

—Kritiko al la kontraŭĉinia filmo «Ĉinio» de
la itala reĝisoro M. Antonioni

de KOMENTARIISTO de *Renmin Ribao*

DE la tago kiam la kvinstela ruĝa flago hisigis super Tian-anmen-placo kaj la nova Ĉinio proklamis sian naskiĝon, diversaj politikaj fortoj en la mondo jam havas malsamajn sintenojn al la terskuaj sociaj ŝanĝoj en nia lando kaj la gigantaj sukcesoj en la socialisma konstruado. Centoj da milionoj da revoluciaj popolanoj kaj vasta amaso de internaciaj geamikoj esprimis admiron kaj simpatian, dum plenmano da reakciaj fortoj montris ekstreman teruron kaj ĝisostan malamon. Tia fenomeno estas ne evitebla por ĉiuj grandaj revolucioj, ĉu en antikva tempo aŭ nun, ĉu en Ĉinio aŭ aliaj landoj. La kontraŭĉinia filmo titolita *Ĉinio* farita de la itala reĝisoro M. Antonioni kaj projekciita en iuj okcidentaj landoj ekde la lasta jaro ja estas reflektado de ekstrema malamo de plenmano da imperiistoj kaj social-imperiistoj en la nuna mondo kontraŭ la nova Ĉinio. La apero de

tiu ĉi filmo estas grava kontraŭĉinia evento kaj furioza provoko al la ĉina popolo.

Kiel nia gasto, Antonioni venis al Ĉinio en printempo de 1972. Kun sia kamerao, li vizitis Pekinon, Ŝanhajon, Nankinon, Suĝoŭ kaj Linhian-gubernion. Tamen lia vizito al Ĉinio estis nek por pliigi komprenon pri Ĉinio, nek por akceli la amikecon inter la ĉina kaj itala popoloj. Kun malamo kontraŭ la ĉina popolo kaj per malhonestaj kaj ege malnoblaj artifikoj li speciale kolektis tiujn materialojn per kiuj oni povas kalumnii kaj ataki Ĉinion, utiligante tiun ĉi ŝancon por atingi kaŝitan celon. Lia filmo tri kaj duonan horojn longa tute ne spegulas la novajn aferojn, novan spiriton kaj novan fizionomion de nia granda patrujo, sed koncentras grandan kvanton da scenoj kaj planoj fiintence distorditaj por ataki niajn gvidantojn, malbeligi la novan socialisman Ĉinion,

kalumnii nian Grandan Proletan Kulturano Revolucion kaj insulti la ĉinan popolon. Ĉiu ajn ĉino kun iom da nacia digno ne povas ne senti gigantan indignon post rigardo de tiu ĉi filmo. Toleri la trompadon de tiu ĉi filmo en la mondo signifas rekonigi la reakcian propagandon pri insulto al la ĉina popolo kiel ĝustan agon, signifas kapitulaci al la internaciaj reakciuloj en ilia provoko kontraŭ Ĉinio. Ni devas ĝisfunde malkaŝi kaj kritiki la reakcian esencon de tiu ĉi filmo por respondi al la provoko farita de la internaciaj reakciuloj kontraŭ la ĉina popolo. Tio estas serioza batalo en la nuna ideologia kaj politika fronto, kiu meritas grandan atenton.

I

En sia rakonto la aŭtoro de la filmo diras, ke li ne volas “komenti Ĉinion, sed nur komenci observi tiun grandan repertuaron de vizaĝoj, gestoj kaj kutimoj” en Ĉinio. Tio estas tute trompaĵo. Ĉiu el la scenoj de la t. n. “dokumenta filmo” havas sian komenton. Tio estas ekstreme malica politika komento kiu kalumnias kaj malbeligas Ĉinion per reakciaj artaj metodoj; tio estas senbrida, publika kaj malkaŝa politika komento kontraŭ Ĉinio, kontraŭ komunismo kaj kontraŭ revolucio.

La filmo komenciĝas de Tian-anmen-placo de Pekino. Tio estas ŝajne natura, sed fakte, tia aranĝo ja servas al la reakcia temo de la tuta “dokumenta filmo”. La rakontanto diras, ke “Pekino estas la politika kaj revolucia centro de Ĉinio”, “la popola respubliko proklamis sian fondiĝon ĝuste tie” kaj “ankaŭ tie leviĝis la tajdo de la Ruĝa Gvardio por la kultura revolucio”. Poste la filmo gvidas la rigardantojn “for de la placo” por “observi” Ĉinion por ke oni rigardu kion la ĉina revolucio alportis al la ĉina popolo. Sekve de tio, aperas serio da reakciaj scenoj, kiuj netoleble distordis la novan Ĉinion. Tia strukturo kaj aranĝo de la filmo estas destinita sole por koncentri la atakan lancpinton al la revolucio gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Insulti la revolucion, nei ĝin kaj oponi kontraŭ ĝi estas la esenco de la filmo.

La reakcia filmo *Ĉinio* komplete ignoras kaj tute neas la grandajn sukcesojn akiritajn en diversaj frontoj en nia socialisma konstruado, intencante konvinki aliajn pri tio, ke troviĝas preskaŭ nenia diferenco inter la nuna socialisma nova Ĉinio kaj la antaŭa duonfeŭda kaj duonkolonia malnova Ĉinio.

Antonioni prezentas Ŝanhajon kiel “industriigitan urbegon” al la rigardantoj nur por kalumnii la socialisman industrion de Ĉinio. Ferminte siajn okulojn al la multaj modernaj grandaj entreprenoj tie, la fotisto de la filmo speciale kolektis iom da senordaj scenoj pri fabrikoj kun simpla ekipaĵo kaj manmanipulado. Evidente staras ĉe Huangpu-rivero ŝipfarejo kiu kapablas fabriki 10,000-tunelajn ŝipojn, ankras en la rivero oceanaj ŝipoj de nia lando, tamen sub la kamerao de Antonioni ĉiuj grandaj varŝipoj en Huangpu-rivero estas de fremdaj landoj, dum Ĉinio havas nur malgrandajn lignajn ŝipojn. Starante sur la starpunkto de imperiistoj, la fotisto de la filmo eĉ asertas publike, ke la ŝanhaja industrio “naskiĝis ne en la nuntempo”, ke “kiel urbo, Ŝanhajo estis konstruita tute de fremdlanda kapitalo en la lasta jarcento”. “La industrioj haste konstruitaj” post la Liberiĝo “estas ofte iom pli bonaj ol grandaj metiejoj”, kaj “la plej granda olerafinejo de la urbo estas ankaŭ mizera fabriko konstruita preskaŭ per forĵetitaj materialoj”. Ĉu tio ne estas publika kaj senbrida fanfaronado pri la “merita servo” de imperiistoj en la agresado al Ĉinio en la 19-a jarcento, kaj tutforta malgrandigo de la grandaj sukcesoj akiritaj de nia popolo per siaj fortoj en disvolvado de la industrio? La reĝisoro ankaŭ uzis tre malnoblajn rimedojn por foti planojn malbeligi niajn laborantajn popolanojn. Kun malica intenco la aŭtoro volas sugesti, ke se Ŝanhajo, la ĉefa industria urbo de Ĉinio, restas tia, do aliaj lokoj estas imageblaj!

Antonioni prezentas Linhian-gubernion kiel “la unuan socialisman montregionon de Ĉinio” al la rigardantoj nur por kalumnii nian socialisman kamparon. En la filmo, scenoj pri la en- kaj eksterlande konata kanalo Ruĝa Flago fulmrapide forpasis. Oni povas vidi nek la imponecon de la “artefarita rivero”, nek prosperecon de Linhian post la transformado de ĝiaj montoj kaj riveroj. Sur la ekrano tede montriĝas fragmentaj terpecoj, solecaj maljunuloj, lacaj brutoj kaj kadukaj domoj... Li senbride trograndigis “la malriĉecon de la kamparanoj” de Linhian-gubernio, priskribante iun montvilaĝon kiel “lokon dezertan kaj forlasitan” kaj tutforte malbeligante vilaĝan elementan lernejon tie. Antonioni ankoraŭ malice diras, ke “estos naive, se ni volas trovi unu kamparan ‘paradizon’” en la nuna Ĉinio. Ĉu tio ne estas nuda kalumnio ke la ĉina kamparo en pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo restas ankoraŭ surtera infero?

La filmo kalumnias la socialisman konstruadon de Ĉinio en diversaj flankoj, de urba konstruo ĝis la popola vivo, de kulturo kaj edukado ĝis fizika

kulturo kaj sporto, de medicino kaj higieno ĝis laŭplana infannasko kaj eĉ infanĝardeno.

Tute ignorante la grandan ŝanĝiĝon de niaj urboj, la filmo montras ke Pekino “restas ankoraŭ antikva urbo” kun “tre simplaj kaj kadukaj” domoj kaj “malkontentiga urba projektado”; ke la nuna Suĝoŭ estas kun “malgranda diferenco de ĝia antikva fizionomio”; kaj ke la ŝanĝiĝo de Ŝanhajo kuŝas nur en tio ke la domoj konstruitaj de la antaŭaj “okcidentaj ekonomiaj imperioj” en la koncesioj fariĝis “la nunaj publikaj oficejoj”.

La filmo pene klopodas nei la rimarkindan pliboniĝon de la vivkondiĉoj de nia popolo, dirante ke “la pekinaj loĝantoj ŝajnas malriĉaj, sed ne mizeraj”. La sinjoro reĝisoro ŝajne montris sian indulgon per la diro ke la ĉinaj popolanoj estas ne mizeraj, sed lia vera intenco estas moki ilian “malriĉecon”. Ĉu li ne ĉiamaniere klopodis en urboj kaj vilaĝoj por kapti iujn scenojn por kalumnii ke la popolanoj estas “malbone vestitaj” kaj “faras penigan laboron” kaj ke oni povas renkonti “malriĉulojn” ĉie en Ĉinio? Ĉio ĉi tio estas nenio alia ol maniero de imperiistaj sinjoroj!

La kaŭzo, ke Antonioni priskribas la postliberigan Ĉinion tiom mallumega kaj volas montri ke nenio estas en bona ordo kaj ĉio estas erara, kuŝas en tio ke li volas doni al rigardantoj la reaktician konkludon ke Ĉinio ne devas fari revolucion. Li atakas la popolajn komunumojn dirante ke ili travivis “malesperon”, kaj babilaĉas ke la Granda Proleta Kultura Revolucio “jetis la sistemon de produktado en konfuzon”, kaj ke ĝi restigis nur “malmultajn” kulturajn antikvaĵojn de la pasinteco. Li eĉ utiligas la planon de popolanoj farantaj la ĉinan tradician gimnastikon *tajĝiĉjŭan* por mensogi ke “la novaj gvidantoj” de Ĉinio volas “aboli” tiun ĉi “antikvan tradicion”. Unuvorte, en la okuloj de tiu ĉi reakciulo Antonioni la socialisma sistemo de Ĉinio estas ne bona, la ĉina revolucio estas fuŝa, kaj la sola elirejo estas iri returnen kaj restarigi la malnovan ordon. Tio plene malkovris la veran kontraŭrevolucion vizaĝon de Antonioni, kiu pozas kiel “maldekstrulo”.

II

En sia filmo, Antonioni misprezentas la ĉinan popolon kaj ĝian fizionomion ĝis netolerebla ekstremo por kalumnii la ĉinan revolucion kaj ataki la socialisman sistemon de Ĉinio. Li provas krei per la filmo la falsan impreson ke la ĉina revolucio ne ŝanĝis la pozicion de la ĉina popolo, nek liberi-

gis ĝian spiriton, kaj ke la ĉina popolo havas nenian entuziasmon por la socialisma sistemo.

La tuta mondo konas ke gigantaj ŝanĝiĝoj jam okazis al la spirito de la liberigita ĉina popolo. **“Ĉu la ĉinaj laborantaj popolanoj ankoraŭ sin tenas en iom da pasinta sklaveco? Ne, ili fariĝis mastroj.”** En nia lando, **“la popolamasoj estis neniam antaŭe tiel inspiritaj, tiel altaj en batalspirito kaj tiel senlime entuziasmaj kiel nun.”** Tamen, Antonioni priskribas la ĉinan popolon kiel amason de homaj estuloj kiuj estas stultaj, malkleraj, izolitaj de la mondo, malgajaj, malviglaj, ne atentantaj higienon, amantaj manĝon kaj plezuron kaj vivantaj sen ia ajn celo. Por malbeligi la ĉinan popolon, li rompis sian kapon por prezenti diversajn vizaĝesprimojn de homoj sidantaj en te-trinkejoj kaj restoracioj, tirantaj ĉarojn kaj vagantaj sur stratoj. Li eĉ ne lasis virinon kun volvepintigitaj piedoj, kaj plue li triviale filmis homojn elblovantajn nazmukon kaj irantajn al necesejo. En Linhian-gubernio, Antonioni iris neinvitite en iun montan vilaĝon kaj direktis sian kameraon al la vilaĝanoj. Kiam la vilaĝanoj esprimis malaprobbon, li do kalumniis ilin ke ili estis “teruritaj” kaj “ofte ŝtoniĝintaj kaj senesprimaj”. Kun “eŭropana fiereco”, Antonioni ĉiurimede intencas makuli la ĉinan popolon. Tio estas granda ofendo al la jam stariĝinta ĉina popolo!

Pli malice estas, ke Antonioni aludas per ĉirkaŭparolo kaj sugesta rimedo, ke la ĉina popolo estas peze subpremata kun ĝeneco en la spirito kaj nekontenta pri sia vivstato. En la sceno de la te-trinkejo en Ĉenghuangmiaŭ de Ŝanhajo, li enmetas fiintence rakonton: “Tio estas stranga atmosfero”, “sopiranta pri la pasinteco, sed lojala al la nuntempo”. Li uzas la frazon “lojala al la nuntempo” en la negativa senco. Efektive li volas kalumnii ke la ĉina popolo subtenas la novan socion pro perforto sed ne el sincereco. Ĉu Antonioni ne ripetfoje sugestas ke la ĉina popolo vivas nelibere? Li senkaŝe mokas la diskutadon de laboristoj kiel “ripetadan, monotonan” kaj “neveran diskutadon”. Li kalumnias la ĉinajn knabojn ke ilia kantado de “politikaj” kantoj prikantantaj Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio estas malakorda kun ilia naiveco kaj amindeco kaj ili tion faras ne el sia volo. Li babilaĉas ankoraŭ ke la homoj estas tiel “prudentaj kaj sindetenemaj”, ke “iliaj sentimentoj kaj doloro estas preskaŭ nevideblaj”. Por li, la ĉina popolo estas ne kontenta pri sia vivo kaj havas grandegan “doloron”, sed ne kuraĝas ĝin esprimi. Kia sensencaĵo! En nia socialisma lando kun la diktaturo de la proletaro, la popolanoj estas la mastroj, la politika situacio estas vigla,

la popolamasoj ĝuas la veran liberecon kaj havas plenan senĝenecon en spirito. Antonioni intencis rampi tra fendoj kaj agiti la ĉinan popolon kontraŭ la nova Ĉinio kaj la socialisma sistemo, tio estas tute vana. Tiuj kiuj sentas “doloron” estas la plenmano da reakciuloj kiuj vane intencas restarigi la diktaturon de bienuloj kaj kompradoraj burĝoj en Ĉinio. La diro, ke la ĉina popolo estas “sopiranta pri la pasinteco”, estas des pli malica kalumnio. Kiu estas “sopiranta pri la pasinteco”? La ĉina popolo profunde malamas la “pasintecon” kiam demonoj kaj monstroj laŭplaĉe tiranadis por centoj da jaroj. Nur la imperiistoj kaj iliaj agentoj en Ĉinio konstante sopiras al ilia perdita “paradizo” kaj tagnokte songas returni Ĉinion en duonfeŭdan kaj duonkolonian staton. Sed la rado de la historio estas nereturnebla. Ĉiu ajn kiu intencas tion fari certe estos frakasita de la rado de la historio!

III

Ankaŭ la teknikoj uzataj de Antonioni en filmado estas ekstreme reakciaj kaj malnoblaj.

En selektado kaj traktado de planoj, li prenis nenion aŭ malmulton el ĉiuj bonaj, novaj kaj progresaj scenoj, aŭ prenis kelkajn el ili kiel geston en la tempo kiam li ĉasis, sed fine fortondis ilin. En kontrasto, li kaptis scenojn de malbonaj, malnovaj kaj postĝintaj aferoj kaj filmis ilin kiel eble plej multe. Neniu nova tornilo, traktoro, dece aspekta lernejo, konstruejo bolanta entuziasme, nek sceno de riĉa rikolto... estas videbla en la filmo. Sed li faris plenajn kaj unuajn planojn de tiuj kiujn li konsideris uzeblaj por kalumnii Ĉinion kaj la ĉinan popolon kaj ne trovis ilin tro longaj. En fotografado de Nankin-a Pontego super Jangzrivero, li fiintence prenis tre malbonajn angulojn por fari tiun grandiozan modernan pontegon ŝajne malrekta kaj ŝanceliĝa. Kaj por fari pluan malbeligon li ankoraŭ aldonis planon de pantalonoj pendantaj por sekigo sub la ponto. Ankoraŭ pli damnindaj estas la fotitaj scenoj pri Tian-anmenplaco. Ĝi ne montras la panoramon de tiu granda kaj majesta placo, nek imponecon de Tian-anmenpordego, kiun la ĉina popolo arde amas. Tamen li uzis multe da filmoj por fotografi homamasojn sur la placo: estas planoj jen malproksimaj, jen proksimaj; jen frontaj, jen postaj; jen kun svarmoj da kapoj, jen kun kruroj kaj piedoj konfuzegaj. Per tiuj planoj li intencis priskribi Tian-anmenplacon kiel senordan bazaron. Ĉu tio ne estas nuda ofendo al nia granda patrolando!

Koncerne al la muntado, la filmo ŝajnas esti interkonfuzita de senordaj planoj kune aranĝitaj

sencele, sed en fakto ĉio estas aranĝita kun malica intenco. Ekzemple, la reĝisoro unue prezentas la argilajn skulptaĵojn montritajn en la ekspozicio ĉe la subtera palaco de la Dektri Maŭzoleoj de Ming-dinastio kiuj bildigas, kiel la tiamaj laborantaj popolanoj estis subpremataj, kiel ili rezistis kontraŭ la reganta klaso kaj kiel mizere vivis la kamparanoj en tiu tempo. Tamen post tio tuj aperis la sceno pri grupo da junaj lernantoj kun ŝoveliloj sur la ŝultro irantaj al la kamparo por laboro, kaj poste estas bildo de la Ĉina-Albana Amikeca Popola Komunumo en kiu unu komunumanino viŝas la ŝviton de sur sia frunto. Per tio la reĝisoro intencis montri ke “vivo en la kamparo signifas ĉiutagan penigan laboron” kaj asertas ke la ĉina kamparo ne estas “paradizo”. La reĝisoro evidente uzas tiun metodon por sugesti ke la kondiĉo de la ĉinaj kamparanoj hodiaŭ estas malmulte pli bona ol tiu en la feŭda socio antaŭ centoj da jaroj.

Ankaŭ la uzo de lumo kaj koloro en la filmo estas fiintenca. La filmo estas fotita plejparte per griza kaj malhela lumo kaj malvarmaj tonoj. Huangpuro rivero estas vualita de malpura nebulo. Stratoj en Pekino estas pentritaj en griza koloro. Montvilaĝojn en Linhian-gubernio regas densaj ombroj. Unuvorte, multaj scenoj donas amarajn, mornajn, melankoliajn kaj malvarmajn impresojn. Des pli venena estas la muzika akompano. La reĝisoro fotis neniun scenon de la ĉinaj modernaj revoluciaj teatraĵoj, sed senskrupule mokis iliajn ariojn. La ario “levu vian kapon, elstarigu vian bruston” kantita de Giang Ŝujing en la pekina opero *Spirito de Long-giang* estas uzata en la filmo por akompani la scenon de porko skuanta la kapon. La koncerna unuo montris ke tio estis nur falsaĵo, ĉar fakte tiu muziko ne estis ludata kiam la sceno estis fotata. Tia intenco kalumnio al la ĉinaj modernaj revoluciaj teatraĵoj kaj atako kontraŭ la ĉina revolucio en literaturo kaj arto estas malica ĝis ekstremo!

La malamo de Antonioni kontraŭ la ĉina popolo povas esti pruvita per lia fotado en Ĉinio. Li publike diris en la filma rakonto, kiel li kaŝe prenis multajn scenojn en la filmo kiel spiono. Li fanfaronis, kiel li “filmis” ĉinan militŝipon en Huangpuro rivero “sekrete evitante la limigon” kaj kiel li tenis la “kameraon kovritan” por kapti “la ĉiutagan realon” en la pekina Vangfuging-strato abrupte. Li plendas ke “estis malfacile aktivadi kun kamerao sur Kianmen-strato”. Kio estas la malfacilo? Estas malfacile esti ŝtelisto. Por kalumnii la ĉinan popolon, li eĉ petis aliajn fabriki interbatadan scenon en la Ĉina-Albana Amikeca Popola Komunumo de Pekino por ke li fotu la scenon. En alia

okazo li postulis aliajn ŝanĝi siajn vestojn laŭ lia gusto, alie li ne faros fotografon. Lia artifiko en ŝtela fotado, perforta fotado kontraŭ alies volo kaj falsado de scenoj mem estas granda malestimo kaj malrespekto al la ĉina popolo.

IV

La apero de tiu kontraŭĉinia filmo sur la internacia scenejo certe ne estas akcidenta kaj izolita okazo. Tio havas internacian fonon.

Nia situacio en- kaj ekster-landa estas ĉiam pli bona dum la lastaj jaroj. La revolucia diplomatia linio de Prezidanto Maŭ akiris novajn pli grandajn venkojn. La ĉina internacia prestiĝo kreskas ĉiutage. La intrigoj de imperiismo kaj social-imperiismo por izoli kaj subfosi Ĉinion hontinde bankrotis. Sed niaj malamikoj ne volontas akcepti sian malvenkon en Ĉinio. Ataki la ĉinan revolucion kaj kalumnii la novan socialisman Ĉinion estas rimedoj uzataj de ili por prepari publikan opinion por efektiviĝi kontraŭrevolucion restaŭron en Ĉinio kaj turni Ĉinion refoje en kolonion kaj duonkolonion.

Kiel ĉiuj scias ke la sovetunia reviziisma renegata kliko estas la sturmanto kaj ĉefa postkulisa estro en internacia kontraŭĉinia aktivado. De Ĥruŝĉov ĝis Breĵnev, ili uzis ĉiujn siajn fortojn por ataki kaj kalumnii la ĉinan popolon. Ili diris ke la ĉinaj popolanoj estis tiel malriĉaj ke ili drinkas akvan supon el komuna kaldrono kaj ne havas eĉ pantalonon por sin vesti; ke la Granda Proleta Kultura Revolucio portis “novan detruon” al la ĉinaj produktaj fortoj; kaj ke la ĉina popolo estas “senfortigita” kaj spertas “gravan malfeliĉon”, vivante “kazernan vivon” ktp. Sed ĉiuj ĉi tiuj malsaĝaj kalumnioj nur servas por malkaŝi la abomenindan vizaĝon de la sovetuniaj reviziismaj renegatoj. Ili gajnis nenion el tio. La kontraŭĉinia mensogo de la sovetuniaj reviziistoj havas malgrandan merkaton en la hodiaŭa mondo. Ĝuste en tiuj cirkonstancoj, kun “objektivo” kaj “vero” kiel mantelo, la reakcia filmo de Antonioni celas trompi la popolon. Kaj kopiante la kalumniojn kaj atakojn de la sovetuniaj reviziistoj, ĝi vane klopodas por ludi rolon kiun ne povas ludi la kontraŭĉinia propagando de la sovetuniaj reviziistoj. En fakto, Antonioni servis nur kiel papago de la bankrotinta kontraŭĉinia propagando de la sovetuniaj reviziistoj.

Post kiam elkoviĝis tiu ĉi kontraŭĉinia filmo, la Usona Brodkasta Kompanio aĉetis ĝin per 250,000 usonaj dolaroj kaj publike projekciis en Usono. Kaj iuj personoj en Usono harmoniis kun ĝi, dirante

ke tiu ĉi reakcia filmo estas “ĉarma”. Ĉio ĉi tio montras ke la fantomo de John Foster Dulles ankoraŭ alkroĉiĝas al aro da usonaj imperiistoj, kaj ankaŭ la kontraŭĉinia filmo de Antonioni konformas al la bezono de tiuj reakciuloj.

Kiel italo, Antonioni neniel povas reprezenti la milionojn da italoj kiuj amike traktas kun la ĉina popolo. La itala popolo certe ne konsentas agadon kontraŭ Ĉinio. Per faro de tiu ĉi kontraŭĉinia filmo, Antonioni sin metas evidente kontraŭ la deziroj de la itala kaj ĉina popoloj plifortigi iliajn amikecajn rilatojn.

La ĉina popolo ĉiam klopodas por disvolvi amikajn kontaktojn kaj reciprokan interkomprenon kun la popoloj de aliaj landoj. En nia kontaktado kun aliaj popoloj, ni neniam devigis ilin akcepti nian vidpunkton. Ni ripetfoje montras ke Ĉinio ankoraŭ estas disvolviĝanta socialisma lando. Kvankam ni akiris grandajn sukcesojn en la socialisma revolucio kaj konstruado, ni tamen neniam kaŝis la fakton ke nia lando ankoraŭ havas mankojn en sia antaŭenmarŝado, ankoraŭ havas postigiĝintajn kaj reakciajn aferojn, tial estas necese daŭrigi la revolucion. Prezidanto Maŭ ofte rimarkigas nin, ke ni devas oponi kontraŭ grandregna ŝovinismo. Ni bonvenigas amikojn de aliaj landoj prezenti kritikojn al niaj laboroj. Tamen, ni devas ĝisfunde malkovri ĉiun ajn, kiu ŝajnis sin kiel “amikon” sed fakte faras malnoblan kontraŭĉinian aktivadon por gajni aprobon de imperiismo kaj social-imperiismo kiuj ekstreme malamas Ĉinion, por ke li ne povu plu blufi kaj trompi la popolon. Nur tio utilas al reciproka interkompreno kaj amika kontaktado inter la popoloj de diversaj landoj.

Tiu ĉi kontraŭĉinia filmo de Antonioni atentigis nin, ke ni devas daŭre teni sobran cerbon kaj neniam forgesi ke restas ankoraŭ fortoj malamaj kontraŭ la ĉina popolo en la mondo kaj ankoraŭ ekzistas akra kaj komplika batalo, kvankam la nuna internacia kaj enlanda situacio estas bonega. Tio estas sendependa de la homa volo. Kompreneble, nenio terura estas la atako kontraŭ Ĉinio. Ĉiuj kontraŭĉiniaj bravuloj, ĉu gravaj homoj aŭ malgrandaj personoj, nur levos ŝtonon por bati siajn piedojn, kian ajn armilon aŭ metodon ili uzas. La ĉina popolo firme kaj kuraĝe antaŭenmarŝos laŭ la socialisma vojo. Kiel nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris antaŭ longe: **“Lasu la reakciulojn en- kaj ekster-landajn tremi antaŭ ni! Lasu ilin diri ke ni estas nekapablaj en ĉio — ni, la ĉina popolo, certe atingos nian celon per niaj nevenkeblaj penoj paŝo post paŝo.”**

Ŝanĝi malutilan riveron en utilan

HAJHE-rivero, unu el la ĉefaj akvosistemoj de Norda Ĉinio, konsistas el la Suda Kanalo, Zija-rivero, Daking-rivero, Jongding-rivero, la Norda Kanalo kaj aliaj pli ol 300 branĉoj. Tiuj riveroj kuniĝas ĉe Tiangin kaj de tie la malsupra parto nomiĝas Hajhe, kiu fluas en Bohaj-maron ĉe Dagukoŭ. La baseno ampleksas pli ol 265,000 kvadratajn kilometrojn inkluzive de la urboj Pekino kaj Tiangin, la plejparto de Hebej-provinco kaj parto de la provincoj Ŝandong kaj Henan. Kaj en tiu regiono troviĝas pli ol 12,000,000 hektaroj da agro kaj pli ol 70 milionoj da loĝantoj.

Tie la jara pluvokvanto ĝenerale estas ĉirkaŭ 500 milimetroj, sed la pluvofalo plejparte koncen-

triĝas en julio kaj aŭgusto. En la supra parto de Hajhe multas branĉoj mallongaj kun granda ŝveligo en pluvsezono kaj en la akvo estas granda kvanto da sablo. La meza kaj malsupra baseno de Hajhe relative ebenas, la fluo malrapidas kaj sedimentas tie koto kaj sablo, tiel ke la riverujo pli kaj pli altiĝas kaj multaj el la riveroj jam fariĝis "riveroj super la ternivelo" barataj de riverdigoj. Malaltas la marborda regiono kie fluas la rivero en mallarĝa riverujo. Granda diferenco troviĝas inter la akvotrapasiga kapablo de la supra parto de Hajhe kaj tiu de ĝia malsupra parto. Tial la malsupra baseno de Hajhe ofte trafis inundon en la pluvoza sezono. En printempo rompiĝas la fluo kaj sekiĝas la rivero pro manko de pluvo. En multaj jaroj tie alterne



La nuna Bajjangdian

okazis sekegeco kaj inundoj, sekve de kio la grundo fariĝis saloza kaj alkaliza. Pro serioza inundo, akvostagno, sekegeco kaj alkalizo la baseno de Hajhe fariĝis fama katastrofa regiono en la historio de nia lando. En la malnova Ĉinio, pro kruela subpremado kaj ekspluatado de la bienuloj kaj naturaj katastrofoj, preskaŭ ĉiujare multaj kamparanoj devis fuĝi, almozpeti kaj vendi siajn infanojn. Dum la inundego en la jaro 1939, la vasta ebenejo de Hebej fariĝis senlima akvejo, pli ol 3,300,000 hektaroj da agro estis kovritaj de inundakvo, en iuj lokoj de la urbo Tiangin boato povis navigi kaj la stagna akvo en ĝi malaperis nur post du monatoj. En la jaro 1942 tie okazis eksterordinara granda sekegeco. Sur la vasta ebenejo kreskis nenio kaj sennombraj kamparanoj fariĝis senhejmaj migrantoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la deziro de la popolo pri ordigo de Hajhe-rivero komencis realiĝi. En la komenca periodo post la Liberiĝo, la Partio kaj la popola registaro faris multajn gravajn aranĝojn: En la supra parto de Hajhe oni konstruis akvorezervejojn kaj plifortigis la laboron de tenado de akvo kaj tero por limigi malsuprenfluan de toranta pluvakvo en la montregionoj; en la meza kaj malsupra partoj oni dragis la riverujojn kaj fortiĝis ĉiujn riverdigojn. En la granda antaŭensalto de la jaro 1958, oni konstruis nombron da grandaj kaj mezgrandaj akvorezervejoj. Prezidanto Maŭ kaj ĉefministro Ĝoŭ partoprenis en laborado de la konstruejo de la Dektri-maŭzolea Akvorezervejo, kaj per tio forte kuraĝigis la popolon de la baseno de Hajhe.

En aŭgusto de 1963, en la regiono de Tajhangmontaro de la supra baseno de Hajhe okazis eksterordinare granda pluvego nevidita en la lastaj cent jaroj. La totala flukvanto de la diluvo estas 1.9-oblo de tiu de la jaro 1939. Kvankam la akvorezervejoj jam konstruitaj en la supra baseno de Hajhe povis teni ĉirkaŭ duonon de la giganta kvanto de pluvakvo, tamen alia parto ankoraŭ kovris multajn kampojn kaj minacis la sekurecon de Tiangin kaj Tiangin-Pukoŭ-a Fervojo. Sub la prizorgo de la Partio kaj la ŝtato kaj forta subteno de la tuta popolo kaj la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio la popolanoj de la baseno de Hajhe heroe batalis kontraŭ la diluvo kaj gajnis venkon. En la 17-a de novembro de la sama jaro Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon **“Nepre jungu radikale Hajhe-riveron”**. Ekde tiam la amasa movado jungi Hajhe-riveron antaŭen disvolviĝas en senprecedence granda skalo. Precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj movado de kritikado al Lin Biaŭ kaj



La filo iros por reordigi la riveron.


reĝustigo de laborstilo, Hebej, Ŝandong, Pekino kaj Tiangin, laŭ la principo de “plenampleksa planado kaj sinteza ordigo”, organizis en ĉiu vintro kaj printempo laborarmeon el centoj da miloj ĝis miliono da homoj por koncentre ordigi la riverojn unun post alia. Samtempe, en gubernioj, komunumoj kaj brigadoj oni organizis milionojn da homoj por konstrui kompletigajn akvoutiligajn instalaĵojn kaj fari fundamentan konstruadon de kamparo, tiel ke formiĝis tajdo de amasa konstruado de akvoutiligo.

En la lastaj dek jaroj, en la meza kaj malsupra parto de Hajhe oni fosis kaj dragis 34 trunkajn riverujojn kun totala longeco de pli ol 3,700 kilometroj kaj dek el ili estis novaj riveroj, kiuj rekte verŝas sian akvon en maron, riparis grandajn digojn kun totala longeco de pli ol 4,300 kilometroj, starigis pli ol 60,000 pontojn, kluzojn kaj kulvertojn, dragis riverbranĉojn kaj faris kompletigajn konstruaĵojn por irigacio kaj drenado. Post plenumo de tiuj projektoj, dekelkoble pligrandiĝis la kapablo de trapasigo de inundakvo en la maron kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj la minaco de diluvo kaj akvostagno en la lastaj pli ol mil jaroj kaŭzita de Hajhe estas fundamente eliminata.

En la montregiono de la supra parto de Hajhe, 80 grandaj kaj mezgrandaj akvorezervejoj kaj 1,500

malgrandaj akvorezervejoj estas konstruitaj. Sur multaj montodeklivoj oni plantis arbojn kaj konstruis ŝtuparkampojn. Dank' al tio erozio multe reduktiĝis kaj agroj senĉese plimultiĝas. Sub la forta subteno de la ŝtato, sinapogante sur la forto de la kolektiva ekonomio popolaj komunumoj klopodis por ekspluati subteran akvon. En la tuta baseno ili boris 490,000 maŝinputojn, per kiuj oni povas irigacii pli ol 2,600,000 hektarojn da agro. Post la konstruo de maŝinputoj kaj irigaciaj kana-

loj la areo de la irigaciaj kampoj de la baseno de Hajhe rapide vastiĝis kaj la agrikultura produkto relative rapide disvolviĝis. En la jaro 1973, la totala produktokvanto de greno de la tuta baseno de Hajhe duobliĝis kompare kun tiu de la jaro 1963. Multaj regionoj kun oftaj katastrofoj kaj malabunda produkto en la historio de nia lando, nun jam fariĝis regionoj kun superbezona greno. Ankaŭ la produkto de kotono kaj aliaj ekonomiaj plantoj ricevis grandan disvolvon.



La akvorezervejo Guanting



Tiangin inundita antaŭ la Liberiĝo

Nepre jungu radikale Hajhe-riveron

1963 estis la jaro, en kiu okazis granda ŝanĝiĝo en la historio de Hajhe-rivero. La 17-an de novembro de tiu jaro la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong persone faris la skribaĵon: “Nepre jungu radikale Hajhe-riveron”. Stimulate de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ dum la pasintaj dek jaroj la popolanoj de la baseno de Hajhe-rivero brave batalis kontraŭ la malutila rivero de mil jaroj por venki inundon, sekegecon, alkalecon kaj aliajn naturajn katastrofojn spite al frosteco en vintro kaj varmego en somero. Per tio ili skribis novan paĝon en la historio de riverjungado en Ĉinio.


KONKURE AL LA KONSTRUEJO



Radikale jungi Hajhe-riveron estas unu el la grandiozaj kaj malfacilegaj laboroj de nia socialisma konstruado. En ĉiu vintro kaj printempo centmiloj ĝis miliono da kamparanoj el diversaj lokoj en norda Ĉinio venis por fosi riverojn kaj konstrui digojn, kluzojn kaj riverbaraĵojn sur la konstruejo longa je centoj da kilometroj. Vintre, kiam furiozis ventego, sableroj vualis la ĉielon; en frosteco la tero fariĝis malmola kiel fero; dum fosado oni devis venki zingibroidajn ŝtonojn, ŝlimon kaj fluan sablon sub la glacia tertavolo. Krome ili devis fosi fluejojn en riveroj kaj konstrui digojn en lagejoj. La konstrua laboro estis peniga kaj malfacila, tamen la malfacilaĵoj kiel ajn grandaj neniom povis ŝanceli la firman decidon de la vasta amaso de konstruantoj pri jungado de la rivero. Kiam la marteloj kaj ferstangoj difektiĝis, ili uzis ŝtonajn batiĵojn anstataŭe en fosado de malmola tero kaj ŝtonoj. En frosta vintro ili ofte deprenis de sur si la vatitajn vestojn kaj saltis en lageton por fosi ŝlimon kaj ŝarĝi ĉarojn. Kiam maskareto atakis, centoj kaj eĉ miloj da homoj saltis en akvon kaj kune formis

homan muron antaŭ breĉo por sekurigi la konstruejojn....

En la pasintaj dek jaroj, kun tia spirito la popolanoj formovis teraĵojn de 1.7 miliardoj da kubmetroj per ŝoveliloj, korboj kaj ĉaroj. Se oni konstruus digon per la elfosita teraĵo, ĝia longeco egalus al 40-oblo de tiu de ekvatoro. De kie venis tiu giganta forto? Iu gvidanta kamarado sur la konstruejo diris: “Tia forto venis de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ.” La skribaĵo de Prezidanto

Dragŝipo fosas la enfluejon de la Nova Jongding-rivero.





Mapo pri jungado de Hajhe-rivero



Maŭ “**nepre jungu radikale Hajhe-riveron**” enkorpigis la koran zorgon de la Partio kaj registaro al la popolo kaj fariĝis grandega movforto de la lasta por venki ĉiujn malfacilojn. Por jungi Hajhe-riveron oni mem iniciate sin anoncis por iri al la konstruejo.

Sur la konstruejo de Hajhe-rivero vaste cirkulis rakonto pri Mu Zonghin, kiu iris al la konstruejo kun korbo. Li estas komunumano de Fuĉeng-gubernio de Hebej-provinco. En la konstruejo li ĉiam prenis sur sin pezan laboron kaj bone kaj rapide plenumis la taskon. Li kreis novan rekordon de transportado per puŝĉaro en distanco de cent metroj kaj pro tio la konstruantoj kromnomis lin “Ĉarpuŝa Majstro”. Kiam kamaradoj demandis al li, por kio li tiel energie laboris, li diris montrante eluzitan korbon: “Jen por ke ni ne forgesu ĝin kaj niaj posteuloj ne prenu ĝin denove!” La korbo registris lian familian historion plenan de sango kaj larmoj kaj la suferojn alportitajn de la rivero al la popolanoj. En iu jaro antaŭ la Liberiĝo superakvego de la rivero breĉis la digojn, pereigis plantaĵojn kaj detruis domojn. Ĝuste en la kriza momento lia patro kiu laboris kiel jardungito estis elpelita el la domo de bienulo. De tiam kun tiu korbo ili almozpetis de vilaĝo al vilaĝo....

Aŭtune de 1965, informiĝinte pri jungado de Hajhe-rivero, la patrino de Mu Zonghin anoncis sian filon kaj donis al li la eluzitan korbon por ke li kunportu ĝin al la konstruejo. Mu Zonghin ofte diris al siaj kamaradoj: “Kiam mi ekmemoras la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ dum puŝado de ĉaro kaj la eluzitan korbon, mi volas formovi monton per unu fojo kaj fosi riveron per unu fosoj!”

Ĉiuj loĝantoj de la baseno de Hajhe-rivero kiel Mu Zonghin kaj lia patrino volis fari sian kontribuon al la jungado de Hajhe-rivero. Ili rigardis montoreformon, kampkonstruadon kaj fosadon de kanalo kiel konkretan agon por jungi Hajhe-riveron. Ĉiu el la konstruantoj sentis sin glora pro persona partopreno en la konstruado de Hajhe-rivero.

Por partopreni en jungado de Hajhe-rivero juna komunumano Haŭ Ŝouhing iris al la konstruejo forlasinte siajn proprajn aferojn. En iu printempo kiam lia familio pretis konstrui novan domon, la supera instanco sciigis ilin pri jungado de la rivero. Por akiri permeson iri al la konstruejo li plurfoje esprimis sian decidon al la gvidantaj kamaradoj: “Konstruado de domo povas esti prokrastita, sed jungadon de la rivero oni ne devas prokrasti.” En 1966 komenciĝis konstruado sur alia rivero. Tiam lia edzino estis akuŝonta. Konsiderante pri tio la gvidantaj kamaradoj diris al li: “Via edzino baldaŭ akuŝos kaj bezonos vian prizorgon. Do vi restu hejme.” Tamen Haŭ Ŝouhing diris: “Ĉio jam estas en ordo, miaj gepatroj povas zorgi ŝin kaj pli grave estas jungi la riveron.” Fine li iris al la konstruejo kun puŝĉaro. Pro tio oni nomas lin “maniulo de river-jungado”.

UNUIĜO ESTAS FORTO

Ĉina proverbo diras: “Unuanima rondo povas translokigi Tajŝan-monton.” En reformado de Hajhe-rivero unuiĝo kaj kunlaboro multe grandigis la forton por venki la malfacilojn, kiel la konstruantoj diris, “ĝi povas kapklinigi altajn montojn kaj translokigi riverojn”. En tiu regiono multaj no-



Armeanoj kaj popolanoj kune laboras sur la konstruejo de Hajhe-rivero.

vaj riveroj kaj pontoj registris aferojn pri unuiĝo kaj kunlaboro de la konstruantoj de la provincoj kaj municipoj Hebej, Ŝandong, Pekino, Tiangin k.a.

Nova Jongding-rivero longas je 63 kilometroj kaj larĝas meznombro je 500 metroj, sur kiu troviĝas dek pontegoj kiuj estas fruktoj de unuiĝo kaj kunlaboro de la popolanoj de Hebej-provinco kaj Tiangin. Por fosi tiun riveron oni formovis cent milionojn da kubmetroj da teraĵo. Tiam la plejparto de la laborspacoj troviĝis en marĉejo, kie estis nek vojo nek trinkakvo, tamen la supera instanco postulis ke la tuta tasko devas esti plenumita en unu vintro kaj unu printempo. Tiam la konstruantoj de Hebej-provinco iniciate prenis sur sin la taskon konstrui digojn kaj fosi riveron. Antaŭ ol ili venis al la konstruejo, spite al vento kaj pluvo la tiangin-aj laboristoj kaj kamparanoj jam komencis konstrui ŝoseojn, instalis elektrajn fadenojn, fosis putojn kaj transportis vivbezonaĵojn kiaj greno kaj karbo al la konstruejo por ke la konstrua laboro glate komenciĝu. Dank' al ilia strikta kunlaboro la tasko estis plenumita antaŭdate.

En fosado de la nova rivero la konstrua sekcio faris ĉion eblan por ne okupi agrikulturan agron kaj translokigi vilaĝojn. Laŭ la plano la Nova Zija-rivero devis trapasi Sivuotoŭ-vilaĝon en Kinghian-gubernio de Hebej-provinco. La konstrua unuo decidis revizii la planon por ke la rivero fluu ĉirkaŭ la vilaĝo por ke la komunumanoj ne translo-



Specialisto-kamparano Hoŭ Ĉenming

kiĝu de sia vilaĝo. Informiĝinte pri tio la kadroj kaj komunumanoj en la vilaĝo tuj kunvenis por diskuti. Ili diris: "Radikale jungi Hajhe-riveron estas granda afero por ŝanĝi la situacion de 'transportado de greno el la Sudo al la Nordo' kaj se oni fosos riveron zigzagan, oni ne nur malŝparos laborfortojn sed ankaŭ malfaciligos la trafluan de akvo. Ni devas zorgi la interesojn de la tuto kaj translo-



Virina putobora grupo de Luanĉeng

kigi nian vilaĝon.” Sub ilia firma postulo oni rektigis la riverujan linion.

Unuiĝo en jungado de la rivero ne nur ebligis rapidan kaj bonan plenumon de diversaj laboroj, sed ankaŭ pliigis la fortojn por venki diversajn naturajn katastrofojn kaj neatenditajn malfacilojn. En oktobro de 1970 okazis maskareto nevidita de multaj jaroj. 7-grada ventego levis ondegojn, kiuj muĝe furioziĝis, superakvis ŝoseojn, breĉis digojn kaj sturmis al la konstruejo. Tiam pli ol 300 konstruantoj kun 20 vagonoj da konstruaj materialoj kaj centmiloj da kilogramoj da greno trempigis en marakvo. Spite al danĝero la konstruantoj klopodis savi la havaĵojn de la ŝtato. Tri lignaj ŝipoj ankrantaj proksime por ŝirmi sin de ventego haste rapidis tien kaj venis ankaŭ ŝiparo gvidata de Baj Ŝizong, sekretario de la Partia Komitato de Bejtang-komunumo kaj ŝipoj de la ĉerivera fiŝprodukta brigado.... Dank’ al ilia kuna klopodado la konstruantoj kaj materialoj estis transportitaj al sekuraj lokoj.

Nekalkuleblaj estis tiaj aferoj sur la konstruejo de Hajhe-rivero. Oni fosis riveron kaj konstruis digojn sen laborlimoj; kie ajn aperis malfaciloj, ĉiuj iris tien por helpi. Antaŭ nova tasko ĉiuj konkure prenis sur sin la plej pezan. Ĉiuj konstruantoj havis decidon: Nepre jungi radikale Hajhe-riveron. Ili nomis la fruktojn donitajn de sia penso “riveroj de unuiĝo” kaj “kampoj de amikeco”.

ALTA RESPONDECEMO AL LA POPOLO

Dum la pasintaj dek jaroj en jungo de Hajhe-rivero la vasta amaso de kadroj kaj popolanoj ne nur venkis diversajn malfacilojn kaj plenumis multajn taskojn en unuiĝo kaj kunlaboro disvolvante komunisman stilon, sed ankaŭ montris altan respondecon al la laboro.

Hoŭ Ĉenming de Kinghe-gubernio en Hebej-provinco kreis dek du sciencajn labormetodojn pri riverfosado kaj digkonstruado en la pasintaj dek jaroj. Por fari bonan konstruan projekton, oni ne sciis, kiom multe li piediris kaj cerbumis! En iu printempo li venis al Zija-rivero kun nombro da konstruantoj sub sia gvido. Tuj post atingo de la celloko li informiĝis ke tie estas kamparano, kiu tre lertas en putofosado kaj bone konas la tiean terstrukturon. Demetinte sian pakaĵon li tuj venis al la kamparano por konsulti lin. La kamparano tre ĝojis kaj kondukis lin al iu puto dirante: “Ĉi tie la tereno estas malalta, la nivelo de la subtera

akvo alta kaj la strukturo de la tertavoloj komplika. Sub la tero dika je 2 metroj estas sableca mola teraĵo kaj sub ĝi flava argilo dika je pli ol 2 metroj.” Hoŭ Ĉenming ankoraŭ vizitis aliajn ĉirkaŭajn lokanojn. Reveninte al la konstruejo li persone faris prospektoradon ĉe la loko kune kun aliaj kamaradoj kaj la prospektorado konstatis la vortojn de la kamparano. Hoŭ Ĉenming kaj la konstruantoj decidis unue formovi la sablecan ŝlimon kaj poste konstrui digon per flava argilo. Laŭ tiu metodo oni ne nur garantiis la kvaliton de la digo sed ankaŭ fosis la riveron ĝis normala profundeco kaj antaŭdate plenumis la taskon.

Same kiel Hoŭ Ĉenming la vasta amaso de kadroj, popolanoj kaj teknikistoj faris projektadon


Aktiva konstruado de ŝtuparaj kampoj malhelpas erozion.



kaj konstruadon kun respondecemo al la popolo. Por ellabori konstruan projekton de nova rivero la projektistoj kaj hidrologiaj laborantoj devis piediri mil liojn por fari esploradojn en multaj brigadoj kaj komunumoj; por trovi unu sciencan donitaĵon geologiaj laborantoj ofte devis bori en multaj lokoj kaj la totala longeco de la boritaj truoj atingis dek-milojn da metroj. Surbaze de granda kvanto da akiritaj materialoj ili centfoje kaj milfoje faris analizojn kaj kalkulojn; por garanti la kvaliton de la rivero deklivoebenigaj laborantoj faris detalan kontroladon kaj helpis konstruantojn ebenigi taluson; kaj por konstrui digojn fortike la konstruantoj ne lasis netaŭgajn objektojn miksiĝi en la digon.

Hodiaŭ, en la baseno de Hajhe-rivero kie ofte okazis katastrofoj en la pasinteco, la larĝaj novaj riveroj kaj fortikaj digoj direktas la torentan fluon dum ŝveliĝo de la rivero en la maron; la kluzoj, baraĵoj kaj interkruciĝantaj kanaloj kondukas la klaran akvon al kampoj; sur la salalkalaj malaltaĵoj jam kreskas bonaj grenplantaĵoj. Vidinte tion oni pretervole diris kun emocio: Kiel heroo estas la popolo kaj kiom grandioza la konstruaĵo!

Ŝirma forstozono kulturata en jungado de la rivero



Post radikala jungado de Hajhe-rivero, antaŭa sala kaj alkala marĉejo fariĝis fekunda kotona kampo.





La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong ekzamenas mapon de la baseno de Hajhe-rivero.

Giganta Ŝanĝiĝo de Hajhe-rivero

一定要
把河
治
好

Surskribo de Prezidanto Maŭ Zedong "Nepre jungu radikale Hajhe-riveron"





Sur la konstruejo por ordigo de Hajhe-rivero




Hajhe-rivero trafluas la urbon Tiangin.

Unu el la tajdobarajoj ĉe marbordo



Akvorezervejo Mijun



Navigo tra akvedukto






Pivota konstruaĵo de
Si-njusi

Antaŭa alkala tero
donas kotonon

Bona rikolto videbla
lu konstruaĵo sur Tuhaj-rivero







Kolzkampo en plena florado

La nuna Hejlonggang


HEJLONGGANG-REGIONO de Hebej-provinco konsistas el 17 gubernioj kaj urboj de la kvin subprovincoj Tiangin, Cangĝoŭ, Hengŝuj, Hingtaj kaj Handan kun pli ol 12,000,000 loĝantoj kaj 2,465,000 hektaroj da agro. Dum centoj da jaroj, la loko estis la plej grava suferanto de naturaj katastrofoj kaŭzitaj de la akvosistemo de Hajhe-rivero.

Post la Liberiĝo, en Hejlonggang estis starigita nombro da akvoutiligaj konstruaĵoj kontraŭ trosekeco kaj inundo, tamen antaŭ ol fari radikalan jungon de Hajhe-rivero, ĝi restis ankoraŭ ĉefa loko, kie oni devis lukti kontraŭ trosekeco en printempo kaj superakvego en somero kaj aŭtuno, kaj ricevi helpon pro katastrofoj en vintro.

Nun torentas kanaloj, rapide iras forstumado kaj kuŝas pecoj kaj pecoj da kampoj kun prosperaj plantoj sur tiu ĉi vasta ebenaĵo. Ĉio ĉi tio montris ke la ofte plagita regiono dum miloj da jaroj jam tute ŝanĝis sian mizeran fizionomion.

La profunda ŝanĝiĝo estis rezulto de la unuiĝa kaj penema konstruado de la vasta amaso de kadroj kaj popoloj dank' al praktiko de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "**Nepre jungu radikale Hajhe-riveron**".

Hjuanhuj-rivero kun longeco de pli ol 160 kilometroj estas unu el la ĉefaj pordrenaj riveroj en la sudorienta parto de Cangĝoŭ-subprovinco. Pro mallarĝeco kaj malprofundeco de ĝia fluejo, en




Reguliga kluzo sur Dului-rivero

la historio ĝia baseno multe suferis de sekeco en senpluva sezono kaj inundo en pluva. Antaŭ la Liberiĝo, la drenado de inunda akvo kaŭzis konflikton inter la gubernioj Nanpi kaj Dongguang, kiu fariĝis pli kaj pli akra pro la subinstigo de bienuloj kaj daŭris kelkdek jarojn. Post la Liberiĝo, la reakciaj klasoj estis faligitaj, tamen la problemo de drena elirejo estis ankoraŭ nesolvita pro parta jungado malhelpate de la reviziisma linio, tiel ke ĉiujare kelkdek mil hektaroj da agro restis ankoraŭ inunditaj. Poste, kvankam tiu problemo estis solvita post multa penado, tamen oni dependis nur de la ŝtato en akvoutiliga konstruado neglektante la fortojn de popolamasoj. En tiu tempo, la projekto por jungi la riveron postulis investon de pli ol 39,900,000 juanoj kaj tempon de tri jaroj. Pro la granda investo kaj longa tempo, la jungado de la rivero estis prokrastita.

En la jaro 1963, la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**Nepre jungu radikale Hajhe-riveron**” multe kuraĝigis la kadrojn kaj popolanojn ĉe ambaŭ bordoj de Hjuanhuj-rivero. Ili diris: “La maljunaj revoluciuloj faligis imperiismon, feŭdismon kaj burokratan kapitalismon, la tri grandajn montojn pezantajn sur la kapo de la popolo, ĉu ni ne povos profundigi kaj larĝigi Hjuanhuj-riveron kaj dreni

Pivota akvoutiliga konstruo de Zija-rivero en Hianhian-gubernio de Hebej-provinco



la stagnan akvon en maron?” Dank’ al plena mobilizo de amasoj, la konstruaĵo estis finita nur per unu vintro kaj printempo kaj triono de la antaŭdifinita investo, per kio la popolamasoj starigis la unuan ekzemplon de ŝparema jungado de rivero.

La sukceso en dragado de la rivero edukis la kadrojn kaj pluapaŝe konigis al la amasoj ilian forton. Sekve de tio, la amasa movado por jungi radikale Hajhe-riveron estis levita al nova tajdo. Ĉiun vintron kaj printempon de 1965 ĝis 1968, kolektiĝis 400,000-500,000 popolanoj de Hebej por fosi Novan Zija-riveron kaj Novan Fujung-riveron kaj fortikigi la nordan digon de Hutuo-rivero, tiel ke la superakvego de riversistemo de Zija ŝanĝis sian direkton kaj fluis en maron laŭ nova vojo. La nova Zija-rivero tri kilometrojn larĝa kaj pli ol 140 kilometrojn longa estas la nuna plej granda artefarita pordrena kanalo de Ĉinio.

La funkciado de la ĉefaj kontraŭinundaj konstruaĵoj en Hejlonggang-regiono multe liberigis la homan, materian kaj finanĉan fortojn. Tamen, antaŭ dek jaroj tre streĉa estis tie la lukto kontraŭ superakvego en pluva sezono.

Ĉiujare, antaŭ ol fini la lukton kontraŭ sekeco por printempa semado, oni jam komencis laboron kontraŭ superakvego. Por batalo kontraŭ superakvo, nur Hianhian-gubernio sola ĉiujare devis pretigi dekmil lignajn fostojn, kelkdek mil fragmitajn matojn, pli ol cent mil jutajn sakojn, kelkcent mil kg. da pajlo... Dum pluva sezono, kiam furioze altiĝis riverakvo, la ĉefaj kadroj kaj viroj de la kamparo devis forlasi aliajn laborojn kaj flegadon de plantoj por ascendi la digon pogrupo kaj fari patroladon tage kaj nokte, tamen inundo kaj difektiĝo de domoj ankoraŭ ne povis esti evititaj.

Nun la ŝtato rimarkinde ŝanĝiĝis kun la sukcesa jungado de Hajhe-rivero.

En 1963, al Baliĝuang-brigado de Ĝangcun-komunumo, la plej malalta loko de la gubernio, venis de la supra baseno akvego kun flukvanto de pli ol 700 kubmetroj sekunde. Se tio okazus en la komenca periodo post la Liberiĝo, por ne paroli pri tempo antaŭ la Liberiĝo, ĝi certe kaŭzus neniu scias kiom grandan inundon. Tamen, tiam la akvego glate trafis. Dank’ al jungado de Hajhe-rivero, Hianhian-gubernio turniĝis de grenomanka gubernio en grenosuperfluan. La grena produktokvanto de tiu gubernio en 1973 plimultiĝis je kvar dekonoj ol tiu de 1972, kaj superis tiun totalan de la pasintaj kvin jaroj. Kaj Siŝiba-vilaĝo, plej multe suferinta de katastrofoj en la historio, vendis plej grandan kvanton da superflua greno en la gubernio.

La Granda Proleta Kultura Revolucio akcelis la disvolviĝon de la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj pli kaj pli rapidigis la kompletigadon de akvoutiligaj konstruaĵoj en Hejlonggang-regiono. Oni jam elfosis pli ol 1,000,000,000 kubmetrojn da teraĵo por kompletigi surterajn drenajn konstruaĵojn, kaj boris maŝinputojn en ĉiu sezono. Dum la lastaj dek jaroj, la tieaj maŝinputoj atingis pli ol 155,000, el kiuj duono estis borita en la lastaj du jaroj. Ĉiujare, la putoj elĉerpis milionojn kaj milionojn da tunoj da akvo por irigacii kampojn. En tiu regiono ĉiu havas 1/15 hektaron da akvumita kampo, kio kreis favoran kondiĉon por stabila kaj alta produkto de greno.


La dragado de irigaciaj kaj drenaj riveroj kaj kanaloj, la konstruado de maŝinputoj kaj la grand-area ebenigado de kampoj kaŭzis ŝanĝiĝon al salalkala tero malfacile transformebla en la pasinteco. En la tuta Hejlonggang-regiono troviĝis 690,000 hektaroj da salalkalaj kampoj en 1963, kaj nun duono el ili estas jam reformita, kaj sur multaj kalvaj terpecoj jam kreskas bonaj plantoj.

Ni prenu Vuji-gubernion, la faman grandan alkalejon en Hejlonggang-regiono, kiel ekzemplon. En ĉiu aŭtunrikolta tempo la grandaj sorgospikoj kaj la verdaj tritikoplantidoj eksterordinare ĝojigis homojn. Kvankam la transformado de alkalejoj estis ankoraŭ nefinita, tamen la antaŭa mizera stato jam tute malaperis.

Antaŭ la radikala jungado de Hajhe-rivero, la popolanoj de Vuji-gubernio alprenis diversajn rimedojn por reformi salalkalan teron, tamen ĉiuj apartaj rimedoj malmulte efikis. Nur post la starigo de ĉefaj grandaj konstruaĵoj por drenado de Hajhe-rivero, kiu donis ĝeneralan elirejon por superakvego, la fosado kaj profundigo de kanaletoj, la borado de maŝinputoj kaj la ebenigado de kampoj, la salalkala tero estis transformita kaj tiuj sintezaj aranĝoj multe efikis. Dank' al tio, la produktokvanto de greno altiĝis jaron post jaro, kaj oni liveris preskaŭ 8,000,000 kg. da greno al la ŝtato en 1973.

La atako de superakvego kaj korodo de salo kaj alkalo faris Hejlonggang-regionon loko kun malmultaj arboj. Nun tie jam kreskas ĉielskrapaj poploj kaj densaj plorsalikoj. Kaj vico post vico da arbarzonoj protektas la ordajn kampojn.

Prezidanto Maŭ montris: **“Sur blanka papero sen ia ajn ŝarĝo, la plej novaj kaj plej belaj skribaĵoj povas esti skribataj, la plej novaj kaj plej belaj bildoj povas esti pentrataj.”** Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolanoj de Hejlonggang-regiono jam pentris per siaj laboremaj manoj en tiu ĉi antaŭe plagita kaj malmulte fruktodona loko mirindajn bildojn kaj daŭre pentros ankoraŭ pli belan kaj brilan bildon.



NOVA GRANDA KARBOMINEJO

Granda kaj moderna Nantun-karbominejo de Ŝandong-provinco estis inaŭgurita al produktado.

Tiu karbominejo troviĝas en Zoŭhian-gubernio ambaŭflanke de la fervojo Tiangin-Pukoŭ. En tiu loko la karbo estas riĉa kaj bonkvalita, la karbotavolo estas dika kaj stabila. La fosado, transportado, levado, akvodrenado kaj ventumado en ŝaktoj kaj surtera produkta sistemo estas komplete mekanikigitaj aŭ aŭtomatigitaj. La nova karbominejo fariĝis grava forto en disvolviĝo de karbo-produktado de Ŝandong-provinco.

NOVA ELDONO DE “KOLEKTITAJ VERKOJ DE LUSIN”

Por adaptiĝi al bezono de la vasta amaso de la laboristoj, kamparanoj, soldatoj, kadroj kaj revoluciaj intelektuloj en studado de verkoj de sinjoro Lusin, la Popola Literatura Eldonejo denove eldonis *Kolektitajn Verkojn de Lusin*.

La kolekto kun 20 volumoj estas presita laŭ la eldono redaktita de la Memoriga Komitato de S-ro Lusin en 1938. La unuaj 10 volumoj estas verkoj memskribitaj de Lusin kaj la restaj estas liaj tradukoj.

Krome la Popola Literatura Eldonejo eldonos ankaŭ *Elektitajn Verkojn de Lusin kontraŭ Konfucianismo*.

Klaraj fluoj de Pekino

EN la okcidenta antaŭurbo de Pekino trembrilas pitoreska arta lago. Ĝi estas fama Jujuantan. Klara akvo senĉese fluas laŭ larĝa kanalo en la lagon. Irinte 25 kilometrojn okcidenten kontraŭ la fluo oni povas atingi Sangiadian, kie la muĝanta Jongding-rivero estas tranĉita de impona baraĵo. La akvo devas turni sin orienten laŭ la akvokonduka kanalo Jongding por kunflui kun la akvo alfluanta de Ĉaŭbaj-rivero tra la akvokonduka kanalo Gingmi kaj poste flui tra diversaj kanaloj en Pekinon.


GRANDA DISVOLVIĜO DE LEGOMA PRODUKTADO

Same kiel aliaj branĉoj de Hajhe-rivero, la riveroj Jongding kaj Ĉaŭbaj ofte katastrofe inundis la basenojn en la historio. Ni prenu ekzemple la


riveron Jongding. Antaŭ pli ol 300 jaroj la rivero estis nomata Vuding (en la ĉina lingvo tio signifas ke la rivero ofte ŝanĝas sian fluejon) kaj ĝia ŝveliĝo ofte atakis Pekinon. En 1698, kun intenco defendi la ĉefurbon de inundo, la imperiestro de King-dinastio movis sennombrajn homojn kaj konsumis multajn materialojn, el kio rezultis ŝtona digo sur la bordo flanke de Pekino kaj tera digo sur la transa bordo. Krome, la imperiestro ordonis alinomi la riveron kiel "Jongding" (la nomo signifas ke la rivero neniam ŝanĝos sian fluejon), ĉar la nomo Vuding estis ne bonaŭgura. Sed fakte la superakvego restis ankoraŭ ne barita kaj ofte inundis ambaŭ bordojn.

Post la Liberiĝo, dank' al la zorgo de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la popolanoj de Pekino kaj Hebej-

En la Ĉefurba Ferŝtala Fabriko



Somere, pekinaj gejunuloj ŝatas naĝi en Kunming-lago de la Somera Palaco.



provinco konstruis per kelkaj jaroj akvo-rezervejojn Guanting kaj Mijun sur la supraj partoj de la riveroj Jongding kaj Ĉaŭbaj, fosis akvokondukajn kanalojn Jongding kaj Gingmi, tra kiuj la akvo de la riveroj Jongding kaj Ĉaŭbaj fluas en Pekinon.

Dank' al tiuj konstruaĵoj, ne nur la grena produktado, sed ankaŭ la legoma produktado de Pekino akiris riĉan rikolton en ĉiu jaro. Registro tiel diras: Antaŭvespere de la Liberiĝo Pekino povis akiri tutjare nur 100,000 tunojn da legomoj, kaj la urbanoj ĉiutage po seponon da kg. Kaj tiuj legomoj estis liverataj koncentre en aŭtuna fino kaj vintra komenco, la specoj estis nur rafano, sinapo, ĉina brasiko kaj aliaj kun malbona kvalito kaj alta prezo. En la komenca periodo post la Liberiĝo, kvankam multiĝis legomaj kampoj kaj specoj, tamen la produktokvanto restis ankoraŭ malalta pro nesufiĉeco de akvo kaj postiĝinteco de poraĵvaj aranĝoj kaj ankaŭ la kvalito kaj specoj ne povis kontentigi la bezonon de la urbanoj.

Dank' al la finkonstruo de la akvokondukaj kanaloj Jongding kaj Gingmi kaj nombro da novaj maŝinputoj, kiuj liveras abundan akvon, serioza praktikado de la Okpunkta Ĉarto de Agrikulturo* kaj aplikado de sciencaj metodoj en kulturado, rapide disvolviĝis la legoma produktado. En la kampoj antaŭe oni povis kulturi nur 2 aŭ 3 fojojn legomojn, nun 4 aŭ 5 fojojn. La areo de la nunaj legomkampoj estas 4-oble pli granda ol tiu antaŭ la Liberiĝo, sed la produktokvanto kreskis 17-oble. La areo de legomaj kampoj malgrandiĝis kvinone, kompare kun tiu antaŭ 10 jaroj, tamen la produktitaj legomoj ne nur povas kontentigi la bezonon de Pekino mem, sed ankaŭ povas esti liverataj parte al aliaj lokoj. En la komunumoj de la sudorienta antaŭurbo de Pekino oni neniam kulturis legomojn antaŭe pro manko de akvo kaj en 1957 ili kulturis nur iom da spinaco en printempo, tomato kaj melongeno en somero. Sed nun oni irigacias siajn kampojn per la akvo de Jongding-

rivero kaj povas liveri al la merkato ĉiujare pli ol 30,000 tunojn da legomoj de pli ol 100 specoj.

SUFIĈA AKVOFONTO POR INDUSTRIO


Antaŭe mankis al Pekino surtera akvo. Post la finkonstruo de la akvokondukaj kanaloj Jongding kaj Gingmi, ĉiutage maksimume 70 kubmetroj da akvo po sekundo fluas en Pekinon, kio pretigis favorajn kondiĉojn por la industrio. Prenu ekzemple la elektran industrion de Pekino. Je la komenco de la 20-a jarcento, la kapacito de elektroproviza instalaĵo de Ŝigingŝan-a Elektra Centralo estis nur 20 kilovatoj, poste fariĝis pli ol 30,000 kilovatoj. La akvo bezonata en vaporumado kaj malvarmigo estis ĉerpita el Jongding-rivero per kelkaj malgrandaj pumpiloj movataj de lokomobiloj. Tiam Jongding-rivero ŝveliĝis en pluva sezono de somero kaj aŭtuno, kaj la akvo entenis multe da

sablo. En vintro kaj printempo la rivero ofte sekiĝis. Pro tio tiam nur kortego, mandarenaj oficejoj kaj fremdlandaj ambasadorejoj povis uzi elektron. Ĝis la Liberiĝo la kapablo de elektra produkto atingis 50,000 kilovatojn, inter kiuj nur 30,000 estis uzataj. Kaj nun la akvo de Jongding kaj Ĉaŭbaj pretigas bonajn kondiĉojn por la pekina elektra industrio. La nuna kapacito de elektroproviza instalaĵo de la Ŝigingŝan-a Elektra Centralo estas dekkelkoble pli granda ol tiu de 1949. La elektra povo produktita en 1972 estas 56-oblo de tiu de 1949.

Kun daŭra kompletigo kaj senĉesa plibonigo de administrado al la akvokondukaj kanaloj Jongding kaj Gingmi, la akvo de la riveroj Jongding kaj Ĉaŭbaj servas al pli kaj pli multaj aliaj fabrikoj, ekzemple, la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio, la Pekina Termoelektra Centralo, la Pekina Ŝtala Fabriko, la Unua Pekina Laminejo, la Pekina Ĝenerala Paperfarejo, la Pekina Prestinktura Fabriko, la

En legomĝardeno de la popola komunumo Sigiking en la antaŭurbo de Pekino





Pekina Vinfarejo kaj iuj kemiaj fabrikoj en Pekino. Tiuj ĉi fabrikoj, ĉu novaj aŭ disvastigataj, ĉiuj akiris rapidan disvolviĝon dank' al la abunda akvofonto. La statistiko en la lastaj 15 jaroj registras, ke la akvokonduka kanalo Jongding sola portis al la industrioj de Pekino 7,266,000,000 kubmetrojn da klara akvo.

NOVA ASPEKTO DE PARKOJ

La antikva urbo Pekino travivis multajn dinastiojn. Ankaŭ la pekinaj parkoj traspertis gigantajn ŝanĝiĝojn. Sed la parkoj akiris la veran junecon nur en la hodiaŭa socialisma nova Ĉinio. La fame konata Ŝiŝahaj estas bona loko por naĝado kaj sketado. Antaŭe Ŝiŝahaj estis vasta lago kun doko speciale servanta al feŭdaj imperiestroj. Ili rabis multegajn materialojn de la laboranta popolo, transportis ilin al Ŝiŝahaj kaj poste sendis en kortegon. En regado de la norda militarista registaro kaj kuomintangaj reakciuloj la surakva kortega transportado estis ĉesigita kaj la lago transformiĝis en marĉejon sur kiu oni kulturis rizon. Post la Liberiĝo oni dragis ĝin kaj alkondukis akvon el la rivero Jongding. Nun la loko fariĝis surakva sportejo bele borderita de arboj. En printempo kiam zefiro verdigis plorsalikojn kaj degelis glacio sur la lago, oni ĝoje remadas sur la akvo. La varmega somero estas plej vigla sezono por la lago.

Miloj kaj miloj da homoj naĝas en la lago respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ ke oni hardiĝu en riveroj, lagoj kaj maroj. En frida vintro la lago estas glaciigita kaj lertaj sketantoj glitas kiel hirundoj sur ĝia surfaco.

La ŝanĝiĝo de Ŝiŝahaj estas nur unu ekzemplo de la pekinaj parkoj. Laŭ ne tre konciza statistiko, la areo de akvo, en kiu oni povas remi, naĝi, bredi fiŝojn kaj kulturigi lotusojn, atingis ĉ. 400 hektarojn, kio estas duoble pli granda ol tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. Efektive, de post kiam la akvo de la riveroj Jongding kaj Ĉaŭbaj estis alkondukita en Pekinon, ankaŭ la vivo de la urbanoj multe ŝanĝiĝis kiel la pekinaj parkoj. Sub la ĝusta gvido de la Partio, dank' al klopodo de la popolo, la riveroj antaŭe malpuraj fariĝis klaraj, la stagnaj akvoj fariĝis fluaj, kaj ĉie sur stratoj kaj stratetoj montriĝis pureco kaj prospero.

**La Okpunkta Ĉarto de Agrikulturo estis ellaborita de Prezidanto Maŭ Zedong laŭ la bona sperto de nia agrikultura produktado. La ĉarto konsistas el ok punktoj: Plibonigo de grundo, racia sterkado, disvolvo de porakva konstruo kaj racia uzo de akvo, kulturo kaj disvastigo de bonaj specioj, racia densa plantado, protekto de plantaĵoj, prevento kaj ekstermo de fiinsektoj kaj plantaj malsanoj, kampa flegado kaj instrumenta reformo.*

Kiu estas Gi Feng?

LA 9-a de majo, 1973, la politika sekcio de iu regimento de la Ŝenjang-a Trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo ricevis leteron kaj 100 juanojn, adresitajn de la revolucia komitato de Ĉaŭ-jang-gubernio, Liaŭning-provinco. En la letero oni skribis: “En la lastaj monatoj ni ricevis sumojn de kontanta mono kaj konsolajn leterojn de multaj kamaradoj de diversaj lokoj al la regiono trafita de natura katastrofo, inkluzive 100 juanojn de kamarado Gi Feng el via trupo. Liaj zorgo al la popolanoj de la suferanta regiono, klara proleta starpunkto kaj senegoisma komunisma stilo estas lernindaj por ni.

“Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolanoj de la suferanta regiono akiris venkon en batalo kontraŭ la katastrofo kaj dece aranĝis sian produktadon kaj vivon. Nun ni resendas la monon kaj petas vin transdoni ĝin kaj la dankon de la tuta popolo de nia gubernio al la sendinto.”

Forte kortuŝite de la letero, sekretario Ĉen Jinkjuan raportis tion al la partia komitato de la trupo. La respondeculo de la partia komitato Ĝang Hianki diris, ke tio estas ĝojinda rezulto de kritiko al Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo kaj linia eduko de la trupo. Li postulis, ke Ĉen Jinkjuan nepre trovu Gi Feng por preni lian aferon kiel vivecan materialon por daŭre konduki linian edukon en la trupo.

Tamen en la nomlisto de la trupo ne troviĝis la nomo Gi Feng, kaj la letero estis adresita nur per la cifero de sia trupo.

Kie do estas Gi Feng?

Sekretario Ĉen venis al la trupo antaŭ nelonge kaj ne tiel bone konis la trupon. Por trovi Gi Feng li pridemandis unue kamaradojn de la trupa oficejo. Iuj supozis, ke Gi Feng eble estas vicsubplotonestro de la tria maŝinpafila kompanio Ĉen Anĝu, ĉar li faris multajn bonojn sub la pseŭdonimo Gi Feng. Alia diris, ke Gi Feng eble estas Vang

Ŝu de la kanona kompanio, ĉar li ofte faris bonojn anonime.

El interparolo kun la tria maŝinpafila kompanio Ĉen Jinkjuan eksciis, ke Ĉen Anĝu estas orfo plenkreskiĝinta en la nova Ĉinio. Kiam li estis knabo kun ruĝa kravato de Juna Pioniro li jam faris bonojn por la popola komunumo, imitante la ekzemplon de Lej Feng. Post sia soldatiĝo, li senĉese altigis sian politikan konscion kaj komprenis, ke tutkore servi al la popolo estas la celo de nia trupo. En la trupo li laboris kiel porkobredisto, kuiristo kaj ĉarkondukisto, kaj kiun ajn laboron li prenis sur sin li ĉiam bone ĝin plenumis. En libertempoj kaj festotagoj li iris al butikoj proksime de la garnizono por helpi ĝin en vendado, aŭ iris al sanatorio por servi tie al kriplaj eksarmeanoj aŭ partoprenis en fizika laboro en fabrikoj aŭ konstruejoj. Kiam oni demandis pri lia nomo, li ĉiam respondis, ke li nomiĝis Gi Feng. Poste oni sukcesis scii lian veran nomon kaj prenis liajn aferojn kiel instrumaterialon por loka elementa lernejo kaj rakontoj pri liaj bonfaroj vaste cirkulas inter la amasoj.

Kio estas pri Vang Ŝu? Ĉen Jinkjuan iris al la kanona kompanio kaj tieaj kamaradoj rakontis al li jenon: Antaŭvespere de la Printempa Festo de 1972, Vang Ŝu veturis al Ĉangĉun por ricevi operacion de apendicektomio en arma hospitalo. En la vagonaro li varme zorgis maljunan onklinon kaj dum elvagoniĝo portis por ŝi sakon kun pli ol 15 kilogramoj da pomoj. Neatendite, ili disiĝis pro tromulteco de pasaĝeroj. Vang Ŝu longe serĉadis antaŭ la stacio, tamen li ne trovis la onklinon. Malheliĝis. Rigardante la sakon en la mano kaj la straton preskaŭ malplenan li brule maltrankviliĝis. Ankaŭ la onklino longe serĉis Vang Ŝu ĉirkaŭ la stacio, tamen ŝi ne sukcesis lin trovi kaj hejmenrevenis per aŭtobuso.

En la sekvanta tago laŭ la raporto kaj postulo de Vang Ŝu la hospitalo prokrastis la operacion kaj sendis personojn por iri kune kun li al la urba poli-

cejo. Kamaradoj de policejo tuj telefonis al ĉiuj policaj stacioj de la urbo, tamen la lastaj ĉiuj respondis, ke neniu perdinto sin anoncis. Fine la 25-a demandita polica stacio donis ĝojindan respon- don: Hejmenreveninte la onklino diris al sia filino pri la perdo de la sako. En la sekvanta mateno la filino raportis tion al la policaj stacioj ĉirkaŭ la fervoja stacio kaj donis al ili sian adreson kaj nomon por faciligi la serĉadon de la ĈPLA-ano.

Malgraŭ doloro de apendicito Vang Ŝu portis la sakon al la onklino. Kiam la onklino demandis lian nomon, li diris: "Mi estas ĈPLA-ano." Firme premante lian manon, la kortuŝita on- klino diris: "Ja multas Lej Feng en ĈPLA!"

Kamaradoj rakontis al sekretario Ĉen multajn laŭdindajn farojn de Vang Ŝu kaj Ĉen Anĝu. Li pensis, ke la penso de la du kamaradoj tre simi- las al tiu de Gi Feng, tamen post enketado li kon- statis, ke ili ne estas Gi Feng.

La Gi Feng, kiu sendis monon al Ĉaŭjang- gubernio, estis netrovita. Ĉen Jinkjuan decidis viziti aliajn kompaniojn.

Li venis al la oka kompanio kaj petis oficirojn kaj soldatojn rakonti al li pri ilia lerno de Lej Feng dum kritiko al Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo kun intenco trovi spuron de Gi Feng. Tamen li neatendite informiĝis pri historio de "rizkultura konsilanto" de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

En la komenco de printempo de 1972 la unua plotono de la oka kompanio iris al iu loko por ple- numi produktan taskon. Nelonge post kiam ili atingis la garnizonon, ili disvolvis reciprokajn helpadon kaj lernadon kun la najbara brigado. En tiu jaro la brigado ellaboris novan planon pri lerno de Daĝaj por transformi parton de la sekaj kampoj kun malalta produktokvanto en rizkampojn kaj pli multe kontribui al la patrolando per plipro- dukto de greno. Tamen la brigado

neniam kulturis rizon kaj al ĝi mankis sperto. Informiĝinte pri tio, kama- radoj de la unua plotono opiniis, ke ili devas laŭeble helpi popolamasojn en disvolvo de produktado. Ili do sendis subplotonestron Hin Ĉanghin kaj soldaton Ĉang Benkuan, kiuj venis de rizkulturaj lokoj, al la brigado por direkti ĝian kulturadon. Printempe ili helpis ĝin semi kaj tansplanti rizidojn; somere ili direktis ĝin en kampaj laboroj kaj aŭtune ili helpis ĝin en rikoltado kaj kune kun la komunumanoj ĝuis ĝojon de bona rikolto.

Forlasinte la okan kompanion, Ĉen Jinkjuan daŭrigis sian serĉadon. Ĝuste tiam la politika sekcio de la regimento ricevis leteron de la elementa lernejo sub la Gilin-a Pedagogia Universitato en Ĉangĉun, kiu varme laŭdis, ke Song Kujming, estro de la kanona subplotono de la dua kompanio estas Lej Feng- tipa eksterlerneja direktanto. Laŭ aferoj menciitaj en la letero Ĉen Jinkjuan opiniis, ke Song Kujming eble estas Gi Feng. Li do iris al la estro de la dua kompanio por esploro.



Je la komenco de 1973 dum plenumado de tasko en Ĉangĉun la kompanio ĉiutage preterpasis la supre diritan elementan lernejon. Rigardante la naivajn kaj viglajn geknabojn en la lerneja ĝardeno li ekmemoris kamaradon Lej Feng, kiu varme laboris kiel eksterlerneja direktanto antaŭ sia morto. Li pensis en si, ke kvankam li ne estas eksterlerneja direktanto, tamen li devas kontribui sian forton kiel Lej Feng por kulturi revoluciajn posteulojn. Li do aĉetis pli ol 30 librojn pri Lej Feng, Ĝang Side, Huang Giguang kaj aliaj herooj, kraĵojn kaj kajerojn kaj donacis ilin al la ruĝgardianeta organizo de la lernejo. "Tio ĉi estas malgranda donaco de ĈPLA-ano al revoluciaj posteuloj. Mi esperas ke vi diligente lernos kaj progresos kun ĉiu tago." Tion dirinte li foriris. Post du monatoj la lernejo trovis la trupon kie servas Song Kujming, kaj la ruĝgardianetoj unuanime petis ke Song Kujming estu ilia eksterlerneja direktanto. Tamen la trupo jam foriris de Ĉangĉun post plenumo de la tasko kaj estas maloportune por li iri al la lernejo. Laŭ peto de la lernejo Song Kujming fariĝis honora eksterlerneja direktanto de la ruĝgardianeta organizo de la lernejo kaj helpas infanojn per korespondado. Spite al intensa okupateco li ofte elpremis tempon por skribi al la ruĝgardianeta organizo. De tempo al tempo li skribis al ili sian komprenadon en studo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj kritiko al reviziismo aŭ sendis al ili revoluciajn rakontojn el ĵurnaloj. Informiĝinte ke la ruĝgardianeta organizo intencas fondi barbiran grupon, li tuj aĉetis per sia militista subvencio barbiran ilaron kaj sendis ĝin al la geknaboj. En sia letero li faris al ili edukon pri la revolucia tradicio de penema luktado kontraŭ malfaciloj. Vidante ke formiĝis ĉe la ruĝgardianetoj moro de farado de bonoj laŭ la ekzemplo de Lej Feng la instruistoj kaj lernantoj de la lernejo pretervole ekmemoris Song Kujming kaj laŭdis, ke li estas bona nevidebla eksterlerneja direktanto.

Kvankam Ĉen Jinkjuan multe klopodis, tamen li ne trovis Gi Feng. Kuraĝigante lin la trupestro diris: "Kvankam vi ne trovis Gi Feng, tamen vi trovis multajn personojn Lej Feng-tipajn!" Li diris ankaŭ: "Kun levita konscio oni faris bonon sen eldiro de sia nomo, Gi Feng troviĝas eble inter ni, tamen ni ne rekonas lin." Je tio la trupestro kaj kamarado Ĉen ekpensis pri la konsola letero skribita de Gi Feng. Eble tiu letero povas solvi la enigmon.

Baldaŭ Ĉaŭĵang-gubernio resendis la konsolan leteron de Gi Feng. Portante tiun leteron, Ĉen

Jinkjuan vizitis ĉiujn kompaniojn por ke oni rekonu la skribo-stilon.

Li revenis denove al la tria maŝinpaŝila kompanio. Legante la leteron, membro de la partifilia komitato kaj estro de la tria plotono sentis ke la skribo estas tre konata por li. Iom cerbuminte li ekmemoris por partianiĝan petskribon legitan de li antaŭ kelkaj tagoj kaj tuj ĝin alprenis. La skribaĵoj de la letero kaj petskribo ne nur similas unu al alia, sed ankaŭ entenas la saman frazon: "Ĉio mia estas donita de la Partio kaj la popolo kaj mi devas dediĉi ĉion al la Partio, popolo kaj komunismo."

"Gi Feng estas ĝuste li — Li Ĝenfeng, vicestro de la kvara subplotono!" unuvoĉe diris la kamaradoj.

La partia filio venigis Li Ĝenfeng. Post pridemando li eldiris la aferon.

En la unua duono de 1973, la trupo faris linian edukon kaj kritikis absurdajn dirojn kaj kalumnion de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kontraŭ la bonega situacio. La movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo pluapaŝe akriĝis la okulojn de la batalantoj kaj Li Ĝenfeng, kamparana filo kun natura proleta klassento, iom post iom ekkonis, ke sub la kondiĉoj de la diktaturo de la proletaro ankoraŭ ekzistas batalo inter la du malsamaj klasoj, du vojoj kaj du linioj. La eduko komprenigis al li, ke la kalumnio de Lin Biaŭ kontraŭ la bonega situacio signifas neon al la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj deviigon de la fundamenta linio de la Partio. Li decidis kontribui sian forton por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj disvolvi la bonegan situacion. Tiam li informiĝis el letero de iu kunlernanto en Ĉaŭĵang, ke tie okazis natura katastrofo. Li pensis, ke tio estas provizora malfacilo renkontata sur la antaŭenmarŝa vojo en iu regiono kaj revolucia batalanto devas ion kontribui por subteni la suferantan regionon en restarigo de produktado. Ĝuste por tio kamarado Lej Feng sendis monon al suferanta regiono. Li do senrimarke sendis sub la nomo Gi Feng al Ĉaŭĵang 100 juanojn ŝparitajn de li.

Post klopodado de pli ol unu monato Ĉen Jinkjuan fine trovis Gi Feng. Lin aparte ĝojigis tio, ke li trovis ne unu Gi Feng, sed multajn.

La mondo progresas en malordo

EKDE la jaro 1973 la monda situacio karakteriziĝas per granda malordo. La revoluciaj popoloj grandpaŝe marŝas en la batalo kaj la mondo ŝanĝas sian fizionomion en la malordo. Vidu la jenajn faktojn:

Neniam ĉesis loka milito. Antaŭ ol estingiĝis la fajro de la hindoĉinia milito, la mezorienta milito jam estis levita. Daŭre disvolviĝas la armita batalo de la afrikaj popoloj por gajni nacian liberigon kaj oponi kontraŭ koloniismo kaj rasisma subpremado.

En multaj landoj kaj regionoj leviĝis nova revolucia amasa movado kaj strika batalo de laboristoj, kio frapas la putran malnovan ordon.


Pli kaj pli ardiĝas la kaŝa kaj malkaŝa batalo inter la du superpotencoj por gajni mondan hegemonion, kaj tio iam eĉ disvolviĝis al rando de milito.

Militaj puĉoj sekvis unu alian. Laŭleĝaj registaroj de pluraj sendependaj landoj estis renversitaj. Renversigaj intrigoj elkovitaj de la superpotencoj estis senĉese malkaŝitaj kaj frakasitaj.

Mezgrandaj kaj malgrandaj landoj plivastigis sian aliancon, akordigis la komunan merkaton kaj faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la hegemoniismo kaj potenca politiko de la superpotencoj en diversaj flankoj. Landoj de okcidenta Eŭropo, precipe tiuj de la Komuna Merkato, rapidigis alianciĝon. Tio estas ĉefa tendenco, tamen samtempe ekzistas inter ili kontraŭdiroj malfacile solveblaj.

Pli kaj pli serioziĝas la politika, ekonomia kaj socia krizo de imperiismaj landoj. Streĉiĝis la liverado de energio en la Okcidento, ĝia ekonomio dronis en ĥaoso kaj la mona sistemo frontis disfalon.

*Trupo de la Gvineaj
(Bissau) Patriotaj
Armitaj Fortoj*



Unuvorte, la mondo troviĝas en malkvieto. Ĉie estas tumulto kaj ŝanĝiĝo. Tia granda malordo de la mondo ja estas manifestiĝo de plua akriĝo de la diversaj fundamentaj kontraŭdiroj de la mondo. Kvankam variaj estas la internaciaj fenomenoj, tamen oni klare vidis la ĉefan fluon en la tumulto, ke la ŝtatoj volas sendependiĝon, la nacioj volas emancipon kaj la popoloj volas revolucion. La situacio de la mondo estas "enture muĝas vento, aŭgurante montpluvegon", kaj la vento blovas nun pli kaj pli forte.

PLUA VEKIĜO DE LA MONDA POPOLO EN MALORDO

Disvolviĝo de la internacia situacio montras, ke la granda malordo tra la tuta mondo estas tre favora al la monda popolo. Ĝi konsternis nur imperiistojn, modernajn reviziistojn kaj reakciulojn de diversaj landoj, edukis, hardis kaj pluaparis vekis la popolon.


La popolo de la mondo pli kaj pli klare konis, ke por gajni sendependecon, emancipiĝon kaj venkon de revolucio oni devas kuraĝi batali. La batalo certe traĭros zigzagan vojon, tamen la popolo certe akiros venkon, se ĝi persistos en la batalo. Daŭre disvolviĝas la revolucia batalo de la hindaĉinia popolo en la nova situacio. Post longa brava batalo, la vjetnama popolo fine gajnis la grandan venkon en la kontraŭagresa milito kaj devigis Usonon subskribi la Parizan Interkonsen-

ton. En la lasta jaro, por defendi la Parizan Interkonsenton, la vjetnama popolo faris senlacan batalon. En Laoso, zigzaga kaj malebena estas la vojo por restarigi pacon kaj efektivigi nacian harmonion. La kamboĝa popolo firme decidis konduki ĝis fino la militon kontraŭ la naciperfida kliko de Lon Nol, kaj akiris pli favoran pozicion en la milito kaj diplomatio. La persista batalo de la korea popolo por sendependa kaj paca reunuigo de sia patrio entombigis la kontraŭleĝan "Korean Reunuigan kaj Restarigan Komitaton de UN" kaj peze batis la intrigon de "du Koreioj" fabrikitan de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La batala ŝtormo de la patriotaj lernantoj de suda Koreio ege maltrankviligis la klikon de Pak Ĝen Hi, kiu praktikas faŝisman diktatoran regadon. Tajlandaj lernantoj levis uraganon kaj renversis la reakcian militistan klikon de Thanom-Praphas rajdantan pli ol 10 jarojn sur la popolo. Spite la katenon de la du superpotencoj la egipta, siria kaj palestina armeoj kaj popoloj decideme faris militon kontraŭ la izraela agreso, kio multe kuraĝigis la araban popolon kaj la popolon de la mondo. La popoloj de la suda kaj aliaj partoj de Afriko persistas en armita batalo por nacia sendependeco kaj emancipiĝo kaj kontraŭ la rasisma reĝimo, kaj la batalo akiris senĉesan disvolviĝon. En septembro de 1973, la Respubliko de Gvineo (Bissau) naskiĝis en la arda fajro de la revolucia armita batalo kaj donis fortan kuraĝigon kaj subtenon al la afrika popolo klopodanta por la nacia emancipo. Ankaŭ multe disvolviĝis la laborista movado de okcidenta

Gemaljunuloj de Albany, ĉefurbo de la ŝtato New York de Usono, manifestacias por plibonigo de la vivo.



Londonaj oficistoj strikas por protesti kontraŭ blokado de salajro.



Eŭropo kaj norda Ameriko. Pro la kreskado de senlaboreco, inflacio kaj flugrapida altiĝo de varprezoj, la vivo de laboristoj en multaj landoj malboniĝis tagon post tago. Krome la petrola krizo serioze influis la ekonomion de tiuj kapitalismaj landoj, kaj la monopola kapitalo intensigis ekspluatadon al laboristoj, kio pli rapidigis politikan vekigon de laboristoj de tiuj landoj. Senĉese leviĝis strikaj bataloj en kapitalismaj landoj.



Ekde 1973 evidente plifortiĝis la batalo de la tria mondo kontraŭ la potenca politiko kaj hegemoniismo de la du superpotencoj. La popoloj de la tria mondo pli kaj pli klare konis, ke la minaco al sendependeco kaj suvereneco de iliaj landoj ĉefe devenas de la agreso kaj ekspansio de la du superpotencoj. Ĉu la du superpotencoj konkuras aŭ komplotas unu kun la alia, ili ĉiam atencas la interesojn de la mezgrandaj kaj malgrandaj landoj, tial ili neeviteble renkontas oponon de ĉiuj landoj. En multaj internaciaj konferencoj la landoj de la tria mondo draste kondamnis hegemoniismon kaj potencan politikon kaj puŝis la du superpotencojn en akuzitecon. La batalo levita de latinamerikaj landoj por oponi la surmaran hegemoniismon de la superpotencoj kaj defendi maran suverenecon nun disvastiĝis al aliaj kontinentoj. Iu klopodadis ŝajnigi sin kiel "naturan aliancanon" de la tria mondo kaj faris timigon al nealiancigitaj landoj. Sed liaj molaj kaj malmolaj rimedoj ne efikis. Li neniel povis formeti la ĉapelon de superpotenco de sur sia kapo kaj ankaŭ ne povis bari la ondegantan torenton de la tria mondo oponantan la du tiranojn.

Pli kaj pli multaj homoj de la tria mondo rekonis lian veran vizaĝon.

Alia grava disvolviĝo estas, ke la landoj kaj popoloj de la tria mondo ekuniĝis por batali kaj senĉese plifortigis la unuiĝon en la batalo. En majo de la pasinta jaro, en Addis-Abeba de Etiopio, gvidantoj de 41 afrikaj landoj solene deklaris, ke ili plifortigos la unuiĝon kaj subtenos unu alian por oponi la komunajn malamikojn. En la komenco de la pasinta septembro, reprezentantoj de la pli ol 70 nealiancigitaj landoj forte kondamnis en Alĝero imperiismon, novan kaj malnovan koloniismon, cionismon, rasismen kaj hegemoniismon. En la kontraŭagresa batalo de la egipta, siria kaj palestina popoloj, la aliaj arabaj landoj prenis unuaniman subtenon al la batalo kontraŭ la komunaj malamikoj. Preskaŭ 20 afrikaj landoj rompintis unu post alia diplomatian interrilaton kun Izraelo por subteni la brave batalantan araban popolon. La arabaj petrolproduktaj landoj ĉesigis liveradon de petrolo al iuj landoj en la Okcidento, kiuj subtenis Izraelon, kio multe konsternis la lastajn. Komunaj interesoj kunligis la landojn de la tria mondo. Ili establis diversajn regionajn kaj fakajn organizojn, fortigis kunlaboron, prenis unuigitan agon por protekti suverenecon kaj naciajn interesojn de siaj landoj kaj senĉese akiris venkon. Fakte pruvis, ke ne la tria mondo timas la superpotencojn, sed la lastaj timas la unuan.

La pluapaŝa vekigo kaj fortiĝo de la tria mondo kaj ĝia kreskanta grava rolo en la internaciaj aferoj estas unu el la okulfrapaj karakteroj de la internacia

Japanaj detalistoj de fiŝoj protestas kontraŭ polucio de maraj akvoj kaŭzita de monopola kapitalo.





*Pozicio de kontraŭaera
mitralo de la Kamboĝaj
Naciliberigaj Popolaj
Armitaj Fortoj*

situacio en 1973. La tria mondo montris forton pli potenca ol iam en la pasinteco. Ĝia voĉo estas neignorebla. Sen partopreno kaj konsento de la tria mondo gravaj internaciaj demandoj restos malfacile solveblaj. Estas pli kaj pli malfacile por la du superpotencoj monopoli la internacian organizon de UN.

ĈIAM PLI AKRIĜAS LA KAŜA KAJ MALKAŜA Batalo INTER LA DU SUPERPOTENCOJ

En la lasta jaro neniam ĉesis la batalo inter la du superpotencoj por gajni hegemonion. Eŭropo ĉiam estas la grava strategia celo de ilia konkurado. La streĉiĝo kaj tumulto de la mezorienta situacio, la konflikto de la subkontinento de suda Azio, malkvieto en la Persa Golfo, ŝtormo en Mediteraneo kaj Hinda Oceano . . . ĉio ĉi tio estas manifestiĝo kaj postsekvo de drasta konkurado de la du superpotencoj. Ili konkurado por gajni mondan hegemonion estas la fonto de malkvieto de la mondo.

Lenin montris: **“Esenca trajto de imperiismo estas konkuro inter kelkaj grandaj potencoj en la klopodo por hegemonio”**, **“malfortigi la rivalojn kaj ruinigi ties hegemonion”**. En la lasta jaro, kaŝa kaj malkaŝa konkuro de la du superpotencoj manifestiĝis en ĉiuj flankoj tra la tuta mondo. Ĉu kunvenejo, merkato kaj batalkampo, aŭ la tero, maro kaj spacego, ĉiuj terenoj fariĝis iliaj konkuretoj. Por grandigi sian terenon, ili sendis ĉien trupojn, armilojn, fabrikis puĉojn, subaĉetis lakeojn, starigis pupojn, penetris unu en la alian, subfosis

unu kontraŭ la alia . . . Senĉese kreskas la konkuro de armado, manovroj unu sekvas alian. En la ĉiufanka konkurado iu superpotenco estis pli feroĉa. Ĝi etendis la manon pli malproksimen. Ĝi ludas la artifikon ŝajnigi atakon en la Oriento por vere ataki en la Okcidento. Ĝi senĉese sendis trupojn por intensigi la minacon al okcidenta Eŭropo, kaj samtempe energie falsigis “malstreĉiĝon” por paralizi la landojn de okcidenta Eŭropo kaj elpuŝi la alian superpotencon. Ankaŭ en aliajn lokojn ĝi trudiĝis laŭplaĉe. Ĝi plue ekspedis multajn militŝipojn en Mediteraneon kaj Hindan Oceanon, kaptis militajn bazojn en Azio kaj intensigis ekonomian kaj militan penetradon en Latinameriko. Unuvorte, ĝi kaptis ĉiun ŝanceton. Kien Usono iris, tien ĝi postsekvis; kie Usono forlasis, tien ĝi enpremiĝis; kie Usono ne havis sufiĉan forton por superregi, tien ĝi eniris. Ĝia ambicio estas granda, sed la milita linio estas tro longa kaj por tio ĝia forto estas ne sufiĉa. Ĝi frontas multajn malfacilojn, tial kvankam ĝi aspektas aroganta, tamen ĝi tuj retiriĝos, se ĝi estos repuŝata. Efektive ĝi aspiras kapti la mondan hegemonion anstataŭ la alia superpotenco, sed ĝi ĉiamaniere neis la konkuron de la du tiranoj.

Nebremsebla estas la intensiĝanta konkurado de la du superpotencoj. En la pasinta junio ambaŭ landoj subskribis iujn interkonsentojn pri t.n. “kunlaboro kaj interhelpo”, “prevento de nuklea milito”, “limigo kaj reduktado de nukleaj armiloj”. Sed antaŭ ol la inko de subskribo sekiĝis, iu superpotenco jam komencis produkti misilojn kun pluraj atombomboj kaj faris subterajn nukleajn

provojn. La alia superpotenco tuj deklaris, ke ĝi kontraŭos al tio per daŭra grandega elspezo por militaj aferoj. En la mezorienta milito de oktobro de la pasinta jaro ili elmetis kunan proponon pri pafĉesigo en la Sekureca Konsilantaro de UN post multfoja interkonsiliĝo kaj komplotado inter si kaj per tio estingis la ardan fajron de la kontraŭ-agresa milito. Tuj post la pafĉesigo, ili agis respektive kun sia fiintenco: unu volis sendi trupojn al la Mezoriento profitante la ŝancon de "pafĉesiga kontrolo" por fari aliformitan militan okupon, kaj la alia tute kontraŭstaris lin, ordonante sian tutan armeon en la mondo esti en "preteco al milito". Antaŭ kelkaj tagoj ili ankoraŭ konspiradis kune, sed nelonge poste ili jam fariĝis malamikoj kolere rigardantaj unu al la alia kun suprenvolvitaĵoj manikoj. La maldensa atmosfero de "malstreĉiĝo" ŝajnigita de ili estis forblovita senspure. Unuvorte, por gajni influferon, la koluzio de la du superpotencoj povas esti nur provizora kaj relativa, kaj celas gajnon de pli grandaj interesoj; ilia konkurado estas longtempa kaj absoluta.

LA DU SUPERPOTENCOJ KADUKIĜAS JARON POST JARO

La du superpotencoj, kiuj plenforte faras ekspansion kaj hegemonion tra la tuta mondo, aspektas kolosaj, tamen ili ambaŭ havas multajn malfacilojn kaj krizojn en kaj ekster la lando, kaj troviĝas en situacio "floroj falas for, nenion oni povas fari".

La usona imperiismo malfortiĝas jaron post jaro kaj jam ne povas bremsi sian malsupreniradon sur la deklivo. Kvankam ĝi faris ĉiujn klopodojn, sed ĝi povis nek solvi enlandajn malfacilojn nek ŝanĝi sian dekadencan tendencon ekster la lando. Ĝi devigite retiriĝis el suda Vjetnamio, sed daŭre portas sur sia dorso la klikojn de Nguyen Van Thieu kaj Lon Nol. Ĝi deklaris, ke 1973 estas "jaro de Eŭropo", kaj elmetis la "Novan Ĉarton de Atlantiko". Sed ĝi pasigis tagojn tre malfacile kaj agnoskis malesperiĝon. Ĝi subtenis Izraelon en ĝia milita aventuro, kaj pro tio ĝi estis kondamnita de multaj landoj. Tiu jaro por Usono estis tre malfavora.

La tagoj de la alia superpotenco estis pli malfacilaj. Nemulte ŝanĝiĝis ĝia ekonomia stato en la pasinta jaro. Agrikulturo restis same fuŝa kiel antaŭe. La tasko de multaj industrioj estis neplenumita kaj la normo de produktado en la kuranta jaro devigite reduktita. Ĉar en ĝia eksterlanda

komerco aperis giganta negativa saldo, ĝi devis vendi multjare akumulitan oron por ŝtopi la deficon. La reganta kliko de ĉi tiu superpotenco alprenis diversajn altpremajn politikojn kontraŭ malkontentegaj laboristoj, kamparanoj, intelektuloj kaj nacimalplimulto, eĉ ekspedis trupojn por subpremi ribelojn de la amasoj kaj masakris la popolanojn per mitraloj kaj tankoj, tamen la opono de la popolo neniam malfortiĝis. Ĝi fakte estis tre malforta, sed por konkuri kun la alia superpotenco, ĝi senbride ekspansiigis armadon kaj preparis sin al milito, pro kio la popolo vivis tre mizere. Por ŝanĝi la malfacilan situacion, ĝi ĉien iradis por humilaĉe almozi pri pruntodono de okcidentaj landoj. En la mondo ĝi ĉien ekspansiis kaj ĉie trafis repuŝon. Ĝia vizaĝo malkovriĝis pli kaj pli klare kaj nun ĝi dronis en ekstrema izoleco. Diplomatoj senditaj de ĝi al diversaj landoj por fari ŝtatrenverson kaj subfosadon estis forpelitaj nombron post nombro. La eŭropa sekureca konferenco, por kiu ĝi faris ĉiujn klopodojn, donis nenian rezulton kaj profiton al ĝi, sed vekis gardemon de aliaj landoj. Ĝi intencis malpacigi landojn de okcidenta Eŭropo, sed kontraŭ ĝia volo, pli firmiĝis la tendenco de alianciĝo de la landoj de okcidenta Eŭropo. Ĝi fervore kolportadis la t.n. "azian kolektivitan sekurecan sistemon", sed trovis neniun klienton. Iu latinamerika ĵurnalo tiel raportis: Se la figuro de Vaŝingtono jam estis mondekonata, do nun en la mondo la plej aĉan reputacion ĝuas tiu ĉi superpotenco.

La mondo jam paŝis en 1974 kaj paŝas laŭ la historia leĝo. En tiu ĉi jaro sendube daŭros la granda malordo, granda dividiĝo kaj granda reorganiziĝo. La mondon daŭre regos malordo, sed ne kvieto. En tiu ĉi tumulto pluapaŝe fortiĝos la revolucia tendenco. La monda popolo pluapaŝe hardiĝos en la batalo, altigos sian konscion, grandigos sian forton kaj puŝos la radon de la historio antaŭen.

Panama popolo pendigis sur la strato de la ĉefurbo slogantabulon en diversaj lingvoj por esprimi, ke ĝi nepre reprenos la suverenecon de Panama-kanalo.





HEĜE-NACIECO

HĜE-nacieco kun pli ol 800 membroj estas unu el la tre malnovaj naciecoj de Ĉinio kaj ankaŭ la plej malgranda inter ĝiaj nacimalplimulto. Prapatroj de heĝe-oj longe loĝis ĉe ambaŭ bordoj de la riveroj Songhua, Huntong, Usuri kaj Hejlong en la Nordoriento de Ĉinio kaj nun ili dise loĝas en gubernioj Tonggiang, Ĵaŭhe, Fujuan, Fugin k. a. de Hejlonggiang-provinco.

Heĝe-oj havas sian buŝan lingvon, sed ne skriban. La lingvo apartenas al Altaj-familio. Antaŭlonge ili jam miksoĝas kun han-oj, tial ili ĉiuj povoscias la han-lingvon.


Antaŭ la Liberiĝo, sub la kruela ekspluatado kaj subpremado de la reakciaj regantaj klasoj heĝe-


oj vivis tre mizere. Post la Evento de la 18-a de Septembro, 1931, la japanaj agresantoj okupis la Nordorienton de nia lando kaj heĝe-oj ankoraŭ pli severe suferis de sklavigado kaj subpremado. Unuiĝinte kun aliaj nacioj heĝe-oj kun batala tradicio brave leviĝis por lukti kontraŭ la japanaj agresantoj, kaj multaj el ili aliĝis al la Nordorienta Kontraŭjapana Unuiĝinta Armeo. Por rompi iliajn rilatojn kun la batalantoj de NKUA, la japanaj diabloj perforte “kunigis vilaĝojn” en 1942, forpelis heĝe-ojn en profundajn montojn kaj praarbarojn, faris senhomecan masakradon al ili kaj eĉ prenis ilin kiel objektojn por eksperimento de bakteriaj armiloj. Pro tio, ĝis la jaro 1945 kiam kapitulacis la japanaj agresantoj, el pli ol 100 heĝe-aj familioj en Tonggiang kiuj devis transloĝiĝi al Kinglongŝan restis nur pli ol 20 kaj la plejparto el ili suferis de gravaj malsanoj. La pli ol 3,000 heĝe-oj en 1930 reduktiĝis al malpli ol 300 en la komenco post la Liberiĝo.

Heĝe-oj sin okupas pri fiŝkaptado kaj ĉasado de generacio al generacio kaj nur malmultaj el ili entreprenas agrikulturon. Ili kulturas ĉefe maizon, sojfabon kaj terpomon.

Parola literaturo de heĝe-oj estas tre evoluinta. *Jimakan* estas unu speco de popola parolado kun kantado sen muzika akompano. *Gjaliankuo* estas eleganta kaj ĉarma popolkanto kun fiksa melodio. Ĝiaj kantvortoj estas plejparte verkitaj inspirate de ĉeloka vidaĵo. Heĝe-aj virinoj ŝatas brodadon. Ili brodis fortajn kaj belajn desegnojn de birdoj, bestoj, fiŝoj kaj geometriajn desegnojn sur vestoj, ŝuoj, ĉapoj kaj antaŭtukoj kiel ornamaĵojn.

Post la Liberiĝo heĝe-oj fariĝis mastroj de la ŝtato tiel en politiko kiel en ekonomio. La Partio kaj la popola registaro donas al ili grandan zorgon en ĉiuj flankoj. Pro la plibonigo de la materia vivo kaj la kuraca kaj higiena kondiĉoj, la nombro de heĝe-oj senĉese kreskas.





La tri grandaj ebenaĵoj de Ĉinio

LA Granda Hing-an-montaro en la Nordoriento de Ĉinio, Tajhang-montaro de la Nord-Ĉinia Regiono kaj Vuŝan-montaro de la Mez-Ĉinia Regiono formas linion kiel limon, okcidente de ĝi estas grandaj altebenaĵoj, grandaj montaroj kaj grandaj basenoj, kaj oriente de ĝi, krom montetaroj sude de Jangzi-rivero, estas la tri grandaj ebenaĵoj de Ĉinio, nome: la Nordorienta Ebenaĵo, la Nord-Ĉinia Ebenaĵo kaj la Ebenaĵo de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero. Ili estas ĉefaj ebenaĵoj de nia lando kaj havas preskaŭ egalan areon de ĉirkaŭ 300,000 kvadrataj kilometroj. La ebenaĵoj de Ĉinio okupas ĉirkaŭ 1,000,000 kvadratajn kilometrojn kaj konsistigas 10% de la totala areo de la

tuta lando. Tiuj ebenaĵoj estas niaj ĉefaj agrikulturaj regionoj, kaj tie densas loĝantaro kaj multas urboj.

NORDORIENTA EBENAĴO


La Nordorienta Ebenaĵo, kiu kuŝas inter la Granda kaj Malgranda Hing-an-montaroj kaj Ĉangbaj-montaro, estas la plej granda ebenaĵo de nia lando kaj formita el aluvioj de Songhua-rivero, Nengiang-rivero kaj Liaŭhe-rivero. La ebenaĵo longas ĉirkaŭ 1,000 kilometrojn de sudo ĝis nordo kaj larĝas ĉirkaŭ 400 kilometrojn de oriento ĝis okcidento. Ĝi inkluzivas Tririveran Ebenaĵon —

En la pasinteco heĝe-oj uzis kanuon el betula trunkŝelo, lignan boaton, fiŝforkon kaj aliajn postigintajn ilojn en fiŝkaptado, tial ili malmulte fiŝkaptis. Nun ili ĝenerale uzas motorŝipojn kaj nilonan reton, tiel ke rapide multiĝis la fiŝkapta kvanto. La registaro donis al ili ankaŭ pafilojn kaj kuglojn por ĉasado. Samtempe kun disvolviĝo de fiŝkaptado kaj ĉasado heĝe-oj komencis ankaŭ agrikulturan produktadon. La loko kie loĝas heĝe-oj estas kunfluejo de la riveroj Hejlong, Songhua kaj Usuri. Tie estas fekunda grundo, kiu kreis por ili bonajn kondiĉojn por disvolvo de agrikulturo.

La Granda Proleta Kultura Revolucio malfermis por heĝe-oj ankoraŭ pli belan perspektivon. Antaŭ la kultura revolucio, en la vilaĝoj kie koncentre loĝas po 30-40 heĝe-aj familioj jam fondiĝis elementaj lernejoj, kiujn vizitas ĉiuj lernoĝagaj

geknaboj, kaj neniĝis analfabeteco inter plenaĝuloj. La Partio ankaŭ kulturis heĝe-ajn kuracistojn kaj instruistojn. Post la kultura revolucio tie stariĝis ĝenerale mezlernejoj, malgrandaj elektrejoj, kuracejoj, butikoj, poŝtejoj, bankoj kaj disaŭdigaj stacioj. Diversaj aferoj rapide disvolviĝas.

En la pasinteco heĝe-oj estis rigardataj kiel “sovaĝuloj” kaj “fiŝistaĉoj”, tamen post la Liberiĝo 20 el ili vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ en Pekino kaj preskaŭ 100 el ili vizitis Ŝaŭŝan, la hejmlokon de Prezidanto Maŭ, kaj Gingsang-montaron, Jan-an, Pekinon, Ŝanhajon, Ŝenjang kaj Harbinon por lernado. La elstaraj reprezentantoj de Heĝe-oj partoprenas en administrado de la ŝtato en diversnivelaĵaj potencaĵaj organoj. En la lastaj jaroj heĝe-oj faris kontribuon por konstrui kaj defendi la landliman regionon kune kun la garnizonantaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.



la kunfluejon de Songhua-rivero, Usuri-rivero kaj Hejlong-rivero en la nordorienta angulo de nia lando.

La onda Nordorienta Ebenaĵo kun nigra grundo estas ĝenerale malpli alta ol 200 metrojn super la

marnivelo kaj unu el la plej ĉefaj agrikulturaj regionoj de nia lando. Ĝi produktas multe da sojfaboj, sorgo, tritiko, sukerbeto kaj lino.

Antaŭ la Liberiĝo, la norda parto de la ebenaĵo kaj la Tririvera Ebenaĵo plejparte estis senhomaj stepoj. Post la Liberiĝo tie oni konstruis multajn ŝtatajn kultivejojn armitajn per agrikulturaj maŝinoj kaj ekspluatis 1,300,000 hektarojn da virga tero. Nun la tiel nomata "Norda Sovagejo" jam fariĝis "Norda Grenejo" kaj ĉiujare produktas grandan kvanton da greno kaj viandaĵoj por la ŝtato. Antaŭe Pangin-regiono ĉe la enfluejo de Liaŭhe en la suda parto de la ebenaĵo ofte suferis de katastrofoj,

sed nun ĝi fariĝis regiono kun vasta irigaciata areo post konstruado precipe en la lastaj jaroj. En la Nordorienta Ebenaĵo industrioj prosperas kaj trafiko facilas kaj troviĝas grandaj urboj Ŝenjang, Harbin kaj Ĉangĉun.

Aeroplanoj disŝutas aldonan sterkon al sojfabaj kampoj de la Nordorienta Ebenaĵo.



NORD-ĈINIA EBENAĴO


La Nord-Ĉinia Ebenajo en la malsupra baseno de la Flava Rivero estas formita ĉefe de aluvioj de la Flava Rivero, Huajhe-rivero kaj Hajhe-rivero kaj plejparte altas je malpli ol 50 metroj super la marnivelo. Ĝi etendiĝas norden ĝis Janŝan-montaro, okcidenten ĝis Tajhang-montaro kaj montoj de okcidenta Henan-provinco, orienten ĝis Bohajmaro kaj la Flava Maro, kaj suden ĝis la norda parto de la provincoj Giangsu kaj Anhuĵ, kuntuŝiĝante kun la Ebenajo de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero.

La malsupra parto de la Flava Rivero dividis la ebenajon en du partojn. La suda parto estas nomata Ebenajo de la Flava Rivero kaj Huajhe-rivero kaj la norda — Ebenajo de Hajhe-rivero. Kiam la Flava Rivero fluas malrapide tuj enirante la Nord-Ĉinian Ebenajon, sedimentiĝas la kotajoj kaj sablo alportitaj de la altebenaĵo inter la provincoj Ŝanhi kaj Ŝenhi, tial la riverfluejo altiĝas jaron post jaro kaj ĝi fariĝis "rivero super la ternivelo". Sub la reakcia regado de la pasintaj dinastioj la oftaj digbreĉiĝoj de la Flava Rivero kaŭzis seriozajn katastrofojn al la popolanoj. Hajhe-akvosistemo havas multajn branĉojn en sia supra baseno, sed nur unu kunfluejon en la malsupra baseno por

enmariĝi. En la pluva sezono la granda torento rapidas de supre malsupren, tial la malsupra baseno de Hajhe ofte suferis de inundo. Ankaŭ Huajhe-rivero facile inundas pro manko de fluejo en la malsupra parto, ĉar iam en ĝin entrudiĝis la akvo de la Flava Rivero, kaj ĝia propra akvo devis flui en Jangzi-riveron. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj la registaro nia popolo faris grandskalan porakvan konstruadon al la Flava Rivero, Huajhe-rivero kaj Hajhe-rivero, venkis multajn diluvojn kaj printempajn sekegecojn kaj disvolvis agrikulturan produkton de la Nord-Ĉinia Ebenajo.

De antikveco la ĉina nacio laboras kaj vivas ambaŭborde de la Flava Rivero kaj kreis longan historion kaj kulturon. En la Nord-Ĉinia Ebenajo troviĝas fekundaj aluvioj, varmas klimato kaj multas pluvoj en somero kun jara meznombra pluvkvanto de ĉirkaŭ 600 milimetroj. Tio pretiĝis tre favorajn kondiĉojn por kresko de plantaĵoj. La ebenajo estas grava agrikultura regiono de nia lando, kie multe produktiĝas tritiko, kotono, sezamo, arakido kaj tabako.

Pekino, la ĉefurbo de nia lando, situas sur la Ebenajo de Hajhe-rivero. Tiangin ĉe Bohajmaro kun prosperaj industrioj estas la plej granda komerca haveno de la norda parto de nia lando.



Tritikaj kampoj de la Nord-Ĉinia Ebenajo


EBENAJO DE LA MEZA KAJ MALSUPRA JANGZI-RIVERO

Jangzi-rivero fluas tra la pitoreska Vuŝan-monto sur la limo inter la provincoj Siĉuan kaj Hubej en la Ebenajon de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero. La ebenaĵo konsistas el la du ebenaĵoj de la meza baseno kaj malsupra baseno de Jangzi. La ebenaĵo de la meza baseno inkluzivas Lianghu-ebenaĵon en la norda parto de Hunan-provinco kaj la meza parto de Hubej-provinco kaj Hubin-ebenaĵon kun Pojang-lago kiel centro. Ĝi plejparte estas malpli ol 100 metrojn alta super la marnivelo kaj malpli ol 50 metrojn ĉe ambaŭ bordoj de la rivero kaj ĉirkaŭ lagoj. La ebenaĵo de malsupra baseno inkluzivas la ebenaĵon ĉe ambaŭ bordoj de Jangzi-rivero en Anhuj-provinco kaj delton de Jangzi-rivero inter Giangsu-provinco kaj Ĝegiang-provinco. Tie troviĝas malalta tereno je malpli ol 10 metroj super la marnivelo. En la suda kaj norda partoj de la Ebenajo de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero ondas montetoj kun alteco je 200-500 metroj super la marnivelo kaj sin levas famaj imponaj montoj Luŝan, Huangŝan, Tianmu, Dabie k.a. Sur la Ebenajo de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero dense interkruciĝas riveroj kaj multas lagoj, inter kiuj estas la fame konataj grandaj dolĉakvaj lagoj de nia lando Pojang, Dongting, Tajhu kaj Ĉaŭhu. Tiu regiono abundas je fiŝoj, trapo, lotuso

kaj fragmito. La delto de Jangzi-rivero estas fame konata kiel la "Akva Regiono". Tie densas akvovojoj grandaj kaj malgrandaj. Dank' al ili oni povas atingi la vastan Tajhu-lagon kaj torentan Jangzi-riveron. Inter riveroj kaj lagoj troviĝas rizkampoj, morusarbaj ĝardenoj kaj fiŝlagoj, kaj pro tio la delto portas la nomon "Regiono de Fiŝoj kaj Rizo". Ĝi estas tre grava agrikultura regiono de nia lando. En la delto riveroj kaj lagoj estas ornamitaj de multaj belaj montetoj, iuj montetoj kun arboj staras meze en lagoj, kaj tio plibeligas la pejzaĝon. La Ebenajo de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero produktas multe da rizo, kotono, tritiko, kolzo, urtiko kaj silko.

En la baseno de Jangzi-rivero multas pluvo de aprilo ĝis septembro kaj ofte okazis inunda katastrofo en tiu regiono, kie Jangzi-rivero enfluas Lianghu-ebenaĵon. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj registaro la popolanoj konstruis digon kun longeco de miloj da kilometroj kaj multajn akvokluzojn, kulvertojn, akvorezervejojn kaj elektrajn staciojn kaj ordigis lagojn ĉe la branĉoj de Jangzi-rivero, tiel ke aperis nova disvolviĝo de agrikultura produkto en la regiono.

La ebenaĵo estas unu el la regionoj kun plej densa loĝantaro kaj tie troviĝas urboj Ŝanhajo, Nankino, Hangĝoŭ kaj Vuhan.



Nova aspekto de kampoj kun interkruciĝantaj kanaloj kaj arboviĉoj de la Ebenajo de Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero

Pri reformo de la hana skriba lingvo de Ĉinio

TUJ legantoj demandis nin pri la reformo de la hana skriba lingvo de Ĉinio. Ni iom parolu pri tio.

Kial reformi la hanan skriban lingvon?

Se oni kalkulas komence de la skribaĵoj sur testudaj karapacoj kaj bestaj ostoj, la hana skriba lingvo havas historion de pli ol 3,300 jaroj kaj estas unu el la skribaj lingvoj de la mondo kun longa historio kaj profunda influo. La hanaj ideografiaĵoj faris grandan kontribuon en la longa historio de la ĉina popolo. En la pasintaj miloj da jaroj, la riĉaj historiaj literaturoj de Ĉinio ja estis skribitaj kaj konservitaj per la hanaj ideografiaĵoj. En la granda revolucia afero gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, la hanaj ideografiaĵoj estis grava ilo por fari marksisman-leninisman edukadon al la ĉina popolo kaj batali kontraŭ la klasaj malamikoj en kaj ekster la lando. Ili funkcias hodiaŭ kaj ankoraŭ funkcios en estonta longa periodo kiel la komuna skriba lingvo de la han-nacia popolo. Tamen, la hanaj ideografiaĵoj havas multajn mankojn:

Unue, ili signas nur ideojn. Ĉiu ideografiaĵo havas sian propran formon, tamen la formo ne markas prononcon. Sciante la prononcon de ideografiaĵo oni ne povas scii ĝian formon, kaj sciante la formon kaj prononcon de ideografiaĵo oni ne povas scii ĝian signifon. Por lerni unu ideografiaĵon oni devas memori ĝiajn formon, prononcon kaj ideon, do tre malfacila estas la afero.

Due, la hanaj ideografiaĵoj konsistas ĝenerale el multaj strekoj, iuj eĉ el pli ol 30 kaj ilia strukturo estas tre komplika. Ĉu por skribado aŭ memorado de ili, estas multaj malfaciloj.

Trie, tre granda estas la nombro de la nun uzataj ideografiaĵoj. La hana skriba lingvo havas sume pli ol 50,000 ideografiaĵojn, el kiuj 8,000 estas ofte uzataj. Sed diplomito de elementa lernejo povas ellerni nur ĉ. 3,000 ideografiaĵojn. Pro la multeco de la hanaj ideografiaĵoj, oni sentas grandan maloportunon kaj devas elspezi multan tempon

ĉu en kompostado, aŭ en telegrafado, tajpado, ideogramoserĉado kaj indeksado.

La lernado de hana skriba lingvo estas tre peniga kaj la uzado estas maloportuna, kio tre malutilas al la studado de la vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj pri Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso kaj la popularigo de edukado kaj altigo de kultura nivelo de nia popolo.

La ĉina popolo antaŭlonge jam deziris reformisian skriban lingvon, por ke ĝi fariĝu facile konebla, memorebla, skribebla kaj legebla. Antaŭlonge la popolamasoj jam simpligis parton de la ideografiaĵoj. Sed la reakciaj regantaj klasoj de la malnova Ĉinio oponis kontraŭ la reformado, ĉar ili volis, ke la popolo ĉiam troviĝu en malklereco, por ke ilia regado longe daŭru. Nur en la liberigita nova Ĉinio la deziro de la popolo pri tiu reformado povas efektiviĝi.

La Komunista Partio de Ĉinio ĉiam zorgadas la reformon de la skriba lingvo. En 1940 la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong jam montris en sia verko *Pri Nova Demokratio*: **“... la skriba lingvo devas esti reformita sub certaj kondiĉoj, kaj nia lingvo devas proksimiĝi al tiu de la popolamasoj.”** Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, oni establis la Komitaton de Reformo de la Skriba Lingvo de Ĉinio kiel gvidan instancon, kaj en la pli ol 20 jaroj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ la tuta Partio kaj la tuta popolo faris aktivan kaj planan reformon al la ideografiaĵoj. Nun tiu reforma laboro jam fariĝis unu el la gravaj konsistigantaj partoj de la kultura afero de la nova Ĉinio.

Kia estas la direkto de la reformado de la hana skriba lingvo?

Prezidanto Maŭ montris frue jam en 1951: **“La skriba lingvo nepre devas esti reformita kaj iri laŭ la komuna direkto de la fonetikaj lingvoj de la mondo.”** Tio signifas, ke la fina celo de la reformo de la hana skriba lingvo estas reformi la ideogra-

fiaĵojn en literan lingvon. Tio estas peniga kaj komplika laboro, kaj postulas relative longan transiran tempon. Nun nia reformo havas tri taskojn: Simpligi la ideografiaĵojn, disvastigi la ĝeneralan parolan lingvon kaj disvastigi la Projekton pri Fonetika Alfabeto de la Hana Lingvo.

Kion oni faris en simpligo de ĝeneralaj ideografiaĵoj?

Simpligo de ideogramoj estas simpligi iliajn formojn kaj malmultigi la nombron de la ideografiaĵoj. Ekde 1956 ni publikigis 515 simpligitajn ideografiaĵojn, kaj simpligis konsistigajn partojn de pli ol 1,700 ideografiaĵoj. Cetere ni arkaikigis pli ol 1,000 senutilajn ideografiaĵojn. La simpligo ne estas radikala reformo. Nun ĝi portis grandan oportunon al legosciigo al infanoj kaj la ĉiutaga uzado de la skriba lingvo. Tial la laboro estas varme aprobita de la tuta popolo, kaj ĝi estos daŭrigata.

Kio estas la interrilato inter la disvastigo de la ĝenerala parola lingvo kaj la reformo de la hana skriba lingvo?

En la malnova Ĉinio, pro la diversaj kialoj de la historio estiĝis diversaj dialektoj kun tute malsamaj prononcadoj. La lingva bazo de la dialektoj malhelpas la komunikadon de la homoj. Disvastigo de tiu ĝenerala parola lingvo celas forigi la lingvan baron, fortigi la popolan unuiĝon kaj akceli la disvolviĝon de ekonomio kaj kulturo. Samtempe starigo de unueca fonetika normo de la hana lingvo en la tuta lando pretigas bazon por transformo de la ideografiaĵoj en literajn vortojn. En lokoj kie jam ekzistas necesaj kondiĉoj la lernejoj nun jam faras instruadon per la ĝenerala parola lingvo. Nun la radiodissendoj ĉefe kaj la filmoj ekskluzive uzas la ĝeneralan parolan lingvon.

Disvastigi la ĝeneralan parolan lingvon ne signifas malpermesi kaj arkaikigi la dialektojn, sed nur celas tion, ke oni parolu ne nur en sia dialekto, sed ankaŭ en la komuna parollingvo de han-nacio kun la pekina elparolo kiel norma prononco.

Kiel statas la disvastigo de la Projekto pri Fonetika Alfabeto de la Hana Lingvo?

La projekto estas uzata por litere signi la ĝeneralan parolan lingvon per latinaj literoj. Ankaŭ tio estas grava prepara laboro por la reformo de ĝeneralaj ideografiaĵoj. Post la sankcio de la Tutlan-

da Kongreso de Popolaj Rezentantoj en 1958 al la projekto, la elementaj lernejoj de la tuta lando komencis apliki ĝin en instruado kiel instrumenton por signi prononcon de la ideografiaĵoj kaj lerni la ĝeneralan parolan lingvon. En iuj lokoj oni legosciigis analfabetojn-plenkreskulojn per la projekto kaj bona rezulto estas akirita. Krome, la projekto ludas tre bonan rolon en transskribo de nomoj de lokoj kaj personoj, en komunikado per flagoj, lumo k.s, en starigo de alfabetaj indeksoj por ideografiaĵoj, en kreo kaj reformo de skribaj lingvoj de nacimalplimulto de nia lando kaj en instruado de la hana lingvo al fremdlandanoj.

La nuna sistemo de fonetika signado ankoraŭ ne estas litera lingvo han-nacia, tamen bazo por formiĝo de tio en la estonto.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon de

Radio Pekino

Por Eŭropo

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
4:00—4:30

GMT Vendredo k Sabato
20:00—20:30

Ondoj(m) 43 33 31

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
19:00—19:30

Ondoj(m) 47 40





Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
20:30—21:00

Ondoj(m) 30 25

Danco kun kaŭĉuka ŝnuro

pentrita de Guoliang




Sur la kovrilo:

Intelektaj junuloj sin hardas kaj kreskas en kamparo.

Sur la dorskovrilo:

Prosperaj plantidoj



EL POPOLA ĈINIO 中國報道


Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (189) 1974

Ĉefa Enhavo

Lin Biaŭ — vera disĉiplo de Kong Kiu	1
Konfucio — pensulo kiu obstine defendis la sklavis- temon	4
Malica motivo, malnoblaj artifikoj	11
Ŝanĝi malutilan riveron en utilan	16
Nepre jungu radikale Hajhe-riveron	19
La nuna Hejlonggang	25
Klaraj fluoj de Pekino	28
Kiu estas Gi Feng?	32
La mondo progresas en malordo	35
Heĝe-nacieco	40
La tri grandaj ebenaĵoj de Ĉinio	41
Pri reformo de la hana skriba lingvo de Ĉinio.....	45

Sur Hiša-insularo de Nia Lando




Reveno post fiŝado


Hiŝa-insularo nomiĝis en antikveco "Kiĝoŭjang". De pratempe ĉinaj fiŝistoj de provincoj Guangdong kaj Fugian jam frekventis de generacio al generacio la insularojn Hiŝa, Nanŝa, Ĝongŝa kaj Dongŝa por kapti fiŝojn. Tiuj ĉi insularoj deantikve estas teritorioj nedisigeblaj de Ĉinio. La insularo Hiŝa konsistas el pli ol 20 insuloj formitaj de koralaj rifoj. La marareo ĉirkaŭ la insularo Hiŝa estas unu el la fiŝejoj kun abundaj fiŝoj kaj aliaj maraj produktaĵoj de nia lando, inter kiuj troviĝas valoraj martestudoj, palinuroj, holoturioj k.a.

La insularo Hiŝa ankaŭ estas paradizo por marbirdoj. La altaj arboj estas bona ripozejo por marbirdoj. Sub la arboj akumuliĝis dika tavolo da guano, kiu estas ne nur bonega natura sterkaĵo, sed ankaŭ ĉefa krudmaterialo por ekstrakti kafeinon por fabriki aspirinon kaj korfortigilon.

Nun la loĝantoj de la insularo klopodas por konstrui la insularon en nekonkereblan fortikaĵon.




Insulo Jonghing de la insularo Hiŝa






Kapto de martestudo




Riparo de retoj





Konstruantoj de la insulo

Vigla fiŝhaveno de Hiŝa-insularo





Loĝantoj de Jonghing-insulo de Hiŝa-insularo kulturis sorgojn por disvolvi agrikulturon.




Huang Ŝengjaŭ, estro de la revolucia komitato de la insularoj Hiŝa, Nanaŝa kaj Ĝongŝa interparolas kun milicanoj.

Bona ripozejo por marbirdoj



Firme memorante la instruon de Prezidanto Maŭ "Altigi singarde-mon, defendi la patrolandon", milicianoj diligente ekzercas sin por ekstermi invadantojn.




Porcelanaĵoj de Gingdeĝen



Porcelana plado
kun orfiŝa desegno

Gingdeĝen de Gianghi-provinco, la fama porcelana urbe-
to de nia lando, havas longan produktan historion kaj apar-
tan stilon formitan en longtempa produktado. Ĝiaj por-
celanaĵoj estas "blankaj kiel opalo, brilaj kiel spegulo,
maldikaj kiel papero kaj belsonaj kiel sonorilo". La pro-
duktaĵoj estas fame konataj pro multeco de specoj, beleco
de formoj kaj riĉeco de koloroj kaj ornamaĵoj.

Sub la direktado de la principo "Kune floru cent floroj;
forigu la malnovajn kaj elŝovu la novajn", la porcelana indus-
trio de Gingdeĝen kritike heredis la tradician teknikon kaj
faris multajn kreaĵojn, tiel ke la produktokvanto multe kreskas
kaj la kvalito senĉese pliboniĝas en la lastaj jaroj.



Tetaso



Drinkilaro kun blua desegno

